

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto

ԹՈՒՔԻՆՅԱԻ
ՅԵՐՈՅԵՆԻՔՈՒՑԻՄՈՅ

Mirjana Hnilička, la nepino de Fran Kolar-Krom,
parolas en la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj
Fotis: Jozo Lovrić

Ĉi-numere legu pri:

KROATIO - MEMBRO DE EŬROPA UNIO EN 2013

**RAPORTO PRI LA 9-a KONGRESO
DE KROATAJ ESPERANTISTOJ EN BJELOVAR**

PEĈJO KEREMPUH EN GUGLO

ESPERANTISTOJ DIALEKTE ELSTARAS

**100-a NASKIĜDATREVENO
DE PROFESORO JOSIP VELEBIT**

IKUE-KONGRESO EN ZAGREBO

2

2011

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Snježana Habulin, Vida Jerman,
Jozo Marević, Radenko
Milošević, Velimir Piškorec,
Josip Pleadin, Mato Špekuljak

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

Neregula

Konto de UZE:

2340009-1110321529
(Privredna banka, Zagreb)

UEA-kodo:

uzes-y

RESUMO

Dank' al la financa subteno de kroata Ministerio pri kulturo kaj la firmao "Pastor" el Zagrebo, nia gazeto povas plu aperi. Ĝojiga novaĵo en la epoko kiam sponsorojn oni malfacile trovas. En ĉi tiu numero vi legos pri diversaj temoj movadaj kaj nemovadaj. Se ĉio fluos laŭ la informoj lanĉitaj fine de junio, Kroatio la 1-an de julio 2013 fariĝos plenrajta membro de Eŭropa Unio. La jaro 2011 estas proklamita jaro de arbaroj, kaj la iniciatan entreprenis ĝuste Kroatio, la lando kun multaj belegaj arbaroj. Protektado de arbaroj apartenas al ekologiaj temoj, samkiel la projekto de bioklimata vitrodomo lanĉita en Francio, kiun ni prezentas al vi.

Esperantistoj ĉiam okupiĝis pri lingvoj, kaj ne mirinde ke ili zorgas ankaŭ pri dialektoj, respektive lokaj idiomoj. Unu tian ekzemplon el norda Kroatio, en kiu la ĉefan rolon havis esperantistoj, ni konigas ankaŭ al vi.

La 100-an naskiĝdatrevenon de fama kroata Esperanto-verkisto Josip Velebit, omaĝis la urbo Vrbovec per aparta simpozio kaj starigo de nova ZEO - memortabulo honore al profesoro Velebit, starigita sur la mezlernejo en Vrbovec, kie li profesoris.

Niaj raportoj gvidas vin al Esperanto-eventoj kiujn vi eble ne povis persone ĉeesti, sed kiuj meritas vian virtualan viziton. Ĝuu la kroatan kongreson en Bjelovar kaj la polan en Nowi Sącz, verŝajne la plej grandajn naciajn Esperanto-kongresojn okazintajn ĉi-jare.

Esperantujo kelkfoje ŝajnas ne nur idilia oazo, sed okazejo de diskutoj kaj disputoj. Nia revuo ekde la komenco decidis paroli aperte pri temoj kiuj interesas averaĝan leganton. Ĉi-foje ni respondas la kritikan artikolon aperintan en "Heroldo de Esperanto", kaj la plenumredaktoro klarigas sian forlason de la lasta jarkunveno de KEL. Rilate al tio ni citas la mondfaman juriston Ivo Lapenna pri la temo de ofendo kaj kalumnio. Guglo atentigis nin pri literatura perlo de kroata verkisto Miroslav Krleža, kaj ni republikigas unu el la fragmentoj de liaj "Baladoj de Peĉjo Kerempuh".

La landa kongreso en Bjelovar instigis daŭrigon de esploroj pri Fran Kolar - Krom, kaj ni prezentas al vi kelkajn tiutemajn novaĵojn. Pri gravaj movadaj eventoj ekstrlande (PIV en interreto) kaj enlande (IKUE-kongreso en Zagrebo) legu ankaŭ ĉi-numere. Kelkaj novaj iniciatoj certe interesos vin, inter ili ankaŭ la propono, ke la jubilea 10-a kongreso de kroataj esperantistoj okazu en Koprivnica. Kaj fine, denove ni enkondukas la rubrikon "El nia leterkesto", ĉar ĝin postulas viaj reagoj.

La redakcio

KROATIO

FARIĜOS LA 28-a PLENRAJTA MEMBRO DE EŬROPA UNIO

“Je la nomo de 27 ŝtatoj membroj, je la nomo de 27 ĉefoj de ŝtatoj aŭ registaroj, mi havas la honoron konigi al vi la bonan novaĵon, ke Kroatio fariĝos la 28-a ŝtato membro de Eŭropa Unio. Tio ne estus ebla sen pena laboro de la kroataj registaro kaj popolo, kaj sen via persona gvidado” - diris la prezidanto de Eŭropa Konsilio, Herman van Rompuy, alparolante la 24-an de junio ĉi-jare, antaŭ la kolektiĝintaj ĵurnalistoj en Bruselo, la premierinon de Kroatio, Jadranka Kosor. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de Eŭropa Komisiono José Manuel Durão Barroso kaj la hungara premiero Viktor Orbán. Antaŭ tio la ĉefoj de ŝtatoj kaj registaroj de 27 EU-ŝtatoj, kolektiĝintaj en la kunveno de Eŭropa Konsilio en Bruselo, invitis la Konsilion de Eŭropa Unio ĝis la fino de junio fini la aliĝ-traktadojn kun Kroatio ankaŭ rilate la 4 restintajn ĉapitrojn.

En la konkludo de Eŭropa Konsilio pri Kroatio estas skribite: “Eŭropa Konsilio laŭdas Kroation pro ĝiaj intensaj streĉoj kiuj ebligis ke la aliĝ-traktadoj atingu la finan fazon. Kontrolado de la restintaj pritraktataj ĉapitroj en la Konsilio, kiu kontinuas, okazas kun plena aprezo de rigora kondiĉigo konforme al la traktad-kadro. En la lumo de la farita progreso kaj pozitiva takso de Eŭropa Komisiono, Eŭropa Konsilio invitis la Konsilion akcepti ĉiujn necesajn decidojn por fini la aliĝ-traktadojn kun Kroatio ĝis la fino de junio 2011, baze de la projekto de komunaj starpuntoj, kiun antaŭ nelonge prezentis Eŭropa Komisiono, intencante subskribi la aliĝ-kontrakton antaŭ la fino de ĉi tiu jaro.”

En tiu dokumento kiel aliĝdato de Kroatio al Eŭropa Unio estas menciita la 1-a de julio 2013.

“Ni staras ĉe la historia momento por Kroatio kaj por okcidenta Balkanio entute, sed ankaŭ por Eŭropa Unio. Hodiaŭ la ĉefoj de ŝtatoj kaj registaroj rekonis la kvaliton de la laboro kaj progreson de Kroatio dum pluraj jaroj” - diris Barroso, aldoninte ke “aliĝo de Kroatio devas esti ekzemplo al aliaj landoj de okcidenta Balkanio, ĉar se la landoj plenumas la rigorajn kondiĉojn, ankaŭ Eŭropa Unio plenumos siajn devojn laŭ la Agendo de Tesaloniko.

Ĝi estas ankaŭ konsiderinda kontribuo al paco, interpacigo kaj ekzistado en la okcidenta Balkanio”.

Viktor Orbán diris: “Mi gratulas ke en neniu momento vi rezignis, kvankam en iuj momentoj ĉio ŝajnis senelira. Mi povas nur diri ke ni, hungaroj, estas tre feliĉaj.”

La lasta interregistara aliĝ-konferenco, dum kiu estis fermitaj la lastaj kvar ĉapitroj, okazis la 30-an de junio, la lastan tagon de la hungara prezidanteco. Post la hungaroj, la prezidantecon de Eŭropa Unio transprenis poloj, kiuj bezonas kelkajn monatojn por prepari la aliĝkontrakton de Kroatio kaj traduki ĝin al ĉiuj 24 oficialaj lingvoj (la 23 ĝisnunaj, kaj la kroata).

Laŭplane, la subskribado de la aliĝkontrakto okazos verŝajne en Varsovio la 9-an de decembro 2011.

Jadranka Kosor en sia parolado en la preskonferenco la 24-an de junio diris: “Mi ĉiam parolis, ke ne ekzistas pli granda donaco por gecivitanoj de Kroatio okaze de la 20-a datreveno de ĝia sendependeco ol estas la fino de la traktadoj por ke Kroatio fariĝu fiera 28-a membro de Eŭropa Unio. Tio nun realiĝas kaj min persone kaj mian registaron plenigas per granda fiero, sed ankaŭ instigas al laboro kiun ni plenumos ĝis kiam Kroatio eksidos kiel plenrajta membro ĉe la tablo de eŭropaj ŝtatoj kaj popoloj.”

En sia parolado la kroata premierino sendis ankaŭ klaran mesaĝon al najbaraj landoj, ke Kroatio, ankaŭ post sia aliĝo al Eŭropa Unio, helpos al ili kaj donos planan subtenon en ilia strebado por aliĝi al Eŭropa Unio.

La lastan tagon de junio, oficiale estis konfirmita ĉio kio en la preskonferenco estis anoncita.

Antaŭ la subskribado de la aliĝkontrakto, la kroata registaro devas fari referendumon inter siaj civitanoj. Kvanam la sondado de publikopinioj varias, ŝajnas ke dum la referendumo la kroata registaro ricevos la necesan subtenon. Poste la kontrakton devos ratifiki la kroata parlamento kaj parlamentoj de ĉiuj ŝtatoj membroj.

MORTIS OTTO VON HABSBURG

La 4-an de julio, en la 98-a jaraĝo, mortis en sia hejmo en Pöcking apud Munkeno, la Grandduko Otto von Habsburg, la filo de la lasta aŭstri-hungara imperiestro Karlo. Li donis grandan kotribuon al faligo de "fera kurteno" kaj paca reunuiĝo de nia tro longe dividita kontinento. Kiam Kroatio en la 1990-aj jaroj decidiĝis pri sendependeco, Otto von Habsburg estis unu el malmultaj okcidentaj eminentuloj kiu publike kaj sen ŝanceliĝo subtenis Kroation. Antaŭ kelkaj jaroj li diris en intervjuo por kroata gazetaro "ke estas granda kaj malfacile korektebla maljusto" ke Eŭropa Unio ne akceptis Kroation kiel membron en la lasta granda vastiĝo, ĉar Kroatio "ekde ĉiam tien apartenas", "certe pli ol Bulgario kaj Rumanio". Je la demando de ĵurnalisto kial li estas tiom insista en siaj por-kroataj starpunktoj li diris, ke li "naskiĝis en Aŭstri-Hungario kaj ke li sentis sin kroato". Ĝis sia 17-a jaro li flue parolis la kroatan.

La prezidanto de Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE), Radenko Milošević, sendis al la familianoj la jenan mesaĝon:

"Al la familio Habsburg mi esprimas sinceran kondolencon pro la morto de la nekronumita kroata imperiestro kaj granda amiko de Kroatio. Forpasis granda amiko de Kroatio, granda katoliko kaj eŭropano. Mi konatiĝis kun la grandduko Otto von Habsburg printempe de 1990, okaze de lia vizito al Kroatio kaj dum lia preleĝo en Zagrebo, kiun li komencis per kroatingvaj vortoj: *Poštovane dame i gospodo, nažalost više ne znam hrvatski* (Estimataj gesinjoroj, bedaŭrinde mi ne plu parolas la kroatan). La manpremado kun la grandduko kaj nia interparolado pri komuneco de ŝtatoj de Baltio ĝis Adriatiko, restis al mi en eterna memoro".

CENSO EN KROATIO

La unuaj, neoficialaj rezultoj pri la censo okazinta en Kroatio en 2011 montras, ke Kroatio havas 4,3 milionojn da loĝantoj, kio laŭ la aserto de la direktoro de Ŝtata statistika instituto, s-ro Ivan Kovač, estas preskaŭ idente kiel dek jarojn pli frue.

ESPERANTO EN KROATIO AL LABOREMULOJ KROATIAJ!

Radenko Milošević

Reage al la artikolo de Etel Zavadlav titolita "Nemezo vokas: libera Dalmatio!", aperinta en "Heroldo de Esperanto".

Pri Nemezo

Nemezo aŭ *Nemesis* (greke: Νέμεσις) estas diino de (legitima) kolero el la helena mitologio. Nemezo laŭ sia volo disdonadis feliĉon kaj malfeliĉon. Ŝi estis la diino de revenĝo kiu intencis ŝanĝi ies sorton sub la slogano "Juĝisto vin akuzas, juĝisto vin juĝas!" La diino Nemezo tamen furiozis kontraŭ tiuj kiuj altrudas kaoson anstataŭ ordo. Sekreta kaj ne tro klara estas tiu pragreka diino! Oni eĉ ne scias kies filino ŝi estis: ĉu de la dia pintulo Zeŭso, aŭ de la mara dio Oceano! Sed ŝi intencis enplektiĝi en alies sorton, forprenante la taskon de aliaj helenaj diinoj Mojroj (greke: Μοῖραι), la diinoj de sorto. Ho, aŭtorino kara, mi ne povas akcepti, ke en via prava kolero kontraŭ malbonaj situacioj en la kroata Esperanto-movado kaj en iuj Esperanto-eventoj, vi similu la agadon de la diino Nemezo.

KEL neglektas la sudan parton de la lando!

Ne ofendiĝu, aŭtorino, sed viaj priskriboj de la 9-a kongreso ne kongruas kun la vero, eble ili estas eĉ iaspeca mensoĝeto! Nek vi estis ununura kongresano el suda Kroatio, nek iu evitis vin! Ja ni du mem interparolis! Kaj kiu kulpas se ne venis multaj sudkroataj, dalmataj esperantistoj? Ĉu nordkroataj esperantistoj? Mi aldonu ankaŭ, ke vi mem gvidis parton de la kongreso, kaj eĉ ne menciis Unuiĝon de zagrebaj esperantistoj. Ĉu tio ofendis min? Ne! Mi proponas, ke vi organizu la kongreson, kiel tion faris bravaj homoj el Bjelovar.

En via teksto vi invitas la legantojn, ke ili subtenu fondon de la fikcia Esperanto-ligo! Ni jam havas regionajn ligojn, kia ekzemple estas Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj, kaj en ĝi membras pluraj ne-Zagrebanoj. Tio ĝojigas nin! Estimata membrino kaj kunlaborantino de "Zagreba esperantisto", nombru kiom da kapablaj, spertaj kaj laboremaj esperantistoj estas en la suda Kroatio kaj en la tuta lando? Oni povas nombri ilin per fingroj de du manoj!

Menciendas, ke pro la refondo de asocio de zagrebaj esperantistoj aperis suspekto, ke temas pri paralela (konkurenca) Esperanto-organizaĵo, alivorte ia nova KEL. En la protokolo de la jarkunveno de UZE, kiun kiel protokolanto subskribis la aŭtorino, klare estis forĵetita tia akuzo. Do, ne temas pri la intenco, ke oni ne organizu novajn fakajn, regionajn aŭ lokajn societojn, sed por realigi tion, oni devas havi: bonvolon, sperton, monon,



volontulojn kaj laboremulojn. Kaj oni ne ornamu sin per mondfama kaj elstara esperantisto, kiu devenas el sino de Sud-Kroatio, kaj kiu en sia verkaro skribis interalie: "Internacia Lingvo (ne) neŭtraligas la homojn."

Pri la movado Lega Nord

La komparo estas ne nur ridinda, sed tre danĝera kaj perfida, kontraŭa al la Konstitucio de Respubliko Kroatio, en kiu, en la artikolo 2, estas skribite: "La suvereneco de Respubliko Kroatio estas nealproprigebla, nedividebla ...". La suda Kroatio estas kerno kaj nesto de la kroatia ŝtato, laŭ la popola diraĝo: "ekde la jarcento sepa". En la suda parto de Kroatio troviĝas perlara de eventoj, homoj kaj atingoj enmasonitaj en la muron de Kroatio kaj ĉizitaj en la ŝtontabuloj: banusoj, dukoj, reĝoj, artistoj, sciencistoj, verkistoj. Ekde la atesto de papo Johano la 8-a al la duko Branimir, Tabulo de Baška, Vinodola leĝaro glagolice skribita, "Mare nostrum", verkoj de Marulić, Držić, Bošković ... senfinas la vico!

Pri "libera Dalmatio"

Ĉu suda Kroatio, respektive Dalmatio, estas okupita? Pri kio temas, do? Sajnas al mi, ke temas pri kriaĉo simila la kontraŭkroatan politikan grupon el Dalmatio fine de la 19-a kaj komenco de la 20-a jarcentoj. Ili estis naciaj perfiduloj, kies intenco estis nacia kaj politika disigo de Dalmatio disde aliaj kroataj regionoj, per uzo de la itala lingvo, kaj aŭtonomio de Dalmatio. Oni nomis ilin "aŭtonomuloj" (kroate: *autonomaši*, aŭ, en la dialekto de Split: *tolomaši*). Historie iliaj radikoj troviĝis en la disfalo kaj malkresko de Venecia respubliko jam ĉe la fino de la 18-a jarcento, kaj ili uzis la sloganon: "Slavoj iam – Kroatio neniam". Dank' al Dio kaj al la batalo de elstaraj kroataj korifeoj kaj *naciuloj* (kroate: *narodnjaci*) el Split (Luka Botić, Juraj Bianchini, Natko Nodilo, Dinko Politeo, Mihovil Pavlinović kaj multaj aliaj) kiuj senprokraste pligrandigis la nacian senton, la *Nacia (kroatia) partio* venkis. La iredentismo de aŭtonomuloj videblis dum la 1-a kaj 2-a mondmilitoj, ĉar ili entuziasme akceptis la italan okupacian armeon! Ni esperu,

ke la krio de la aŭtorino estas nur – miskompreno kaj eraro!

Finaj vortoj

Malgraŭ multaj asertoj, en kiuj la aŭtorino pravas, mi devas al io kontraŭstari. Por la ideo, ke ni laboru pli bone, pli laŭcele, oni batalu en la propra medio, en propraj Esperanto-rondoj kaj -gazetoj. Oni ne akuzadu la enlandan Esperanto-organizon eksterlande. Tio plaĉos al neniu esperantisto, el iu ajn lando, nacio aŭ asocio.

Mia fina mesaĝo al la aŭtorino estas: fartu kun viaj priesperantaj spertoj kaj laboroj tiel, kiel vi belege priskribis en via poemo *Ĉu pluvas, ĉu ventas – ŝi ĉiam bonsentas*, kiun ni aperigis en "Zagreba esperantisto" 1/2008.

Mag. Radenko Milošević,
vicprezidanto de KEL kaj prezidanto de UZE

La legantoj parolas

Nemezo vokas: libera Dalmatio!



Kial tiel malmultaj E-istoj en suda regiono de Kroatio, kial tiom velkinta E-movado en Dalmatio? Jen la respondo, trovita okaze de la ĵusa landa kongreso: simple KEL neglektas la sudan parton de la lando. Ili agas kvazaŭ ili ne meritus nomon Kroata E-ligo, sed Nord-kroata!

La domicila gastiganto estis afabla, bonaspekta sudanino, sed temas pri sinteno kaj agado de organizantoj – ili ĉiuj fuĝis malproksimen kaj ne volis komuniki kun la nura ĉeestanto el Dalmatio – nome mia modesto. Mi memoras la italan movadon Lega Nord, kun frunta persono Umberto Bossi. Ĉu la sama sinteno estas akceptebla inter E-istoj – nobla nordo kaj netuŝinda sudo? Sincere dirite, tio ne ŝonas esperanteske. Se vi sentas sur propra haŭto agadon kvazaŭ vi havas haŭtan malsanon (nur flanke de viaj samlandanoj!) kio ne estas en ordo? Eble Doktoro Esperanto, simile al kelkaj aliaj idealistoj, pretervidis parton de homa naturo – la neĉeeston de supozata socia konscio.

Ĉio finiĝas en negocoj kaj monopolismo por elpreni monon el la ŝtata buĝeto – jam konataj aferoj. Poste dividi la gajnon inter kiel eble malplej multe da personoj – tial ĝenas la sudo.

Mi ne dubas pri la sincero de ĉiuj aŭspiciantoj kaj sponsoroj kiuj ebligis la 9^{an} kongreson – la problemo kuŝas en KEL. Ili prenas Eon ekskluzive por centralizaj celoj: ekster la Zagreba regiono Eo tute ne devas ekzisti, laŭ sinteno de KEL. Tion mi klare legis sur la vizaĝoj de ĉeforganizantoj. Doktoro Esperanto ĉesu turni sin en la tombo – ni fikso la aferon! Kiel? Vidu sube.

Mi havas ideon por proponi al la E-mondo: konsiderante tian KELon, ekskluzive nordkroatan, indus fondi Dalmatan E-Ligon. Nia lando Dalmatio estas turisme altira kaj multaj ŝatus ĝin viziti, inkluzive la dalmatan ĉefurbon Spalaton. Mi vetas ke multaj samideanoj aliĝus al la unua kongreso de DEL – en la suna urbo Spalato, sur la adriatika marbordo.

Karaj legantoj, subtenu la fondon de Dalmata E-Ligo! Ni havas multon por montri al la E-istaro mondveste: la denaska urbo de Ivo Lapenna, aŭ la pitoreska Primošteno, jama ĉemara Esperantujo, ekzemple. Ĉu ne ŝonas bone – la unua kongreso de dalmataj E-istoj? Vivu la estonto, vivu la espero, vigliĝu la dalmatia Esperantio!

Etel Zavadlav

Kopio de la artikolo el "Heroldo de Esperanto"

FUNKCIADO DE LA BIOKLIMATA VITRODOMO



Floreve, asocio fondita en 2011 en Senillé en Puatuo (Francio), celas promocii la ekologian disvolviĝon. Ĝia planita eko-centro kiu notinde entenas bioklimatan vitrodomon estis prezentita la 19-an de junio en la salono Berry en Sénillé.


Norde de la konstruaĵo, taluso [1] kaj vegeta tegmento [2] protektos ĝin kontraŭ malvarmeo. Supre ligna tegajo [3] plilongigos la tegmenton.

Sude matoj el fragmitoj aŭ erikoj [4] limigos la sunradiadon ricevitan somere. Pluvakvo estos kolektita [5] por akumado kaj la bezonoj de la spirulinbredado. En interspaco: akumulatoroj kolektos la elektran energion produktitan de la sunpaneloj kaj de la ventgeneratoro [6].

La sunradiado kiu eniros en la vitrodomon tra grandaj aperturoj en la tegmento sude respuguliĝos sur la interna flanko de la bone izolita tegmento [7]. Rulŝutroj fermos tiujn aperturojn en la nokto. Sur la suda flanko estos ebenaj akvovarmigaj kaj elektroproduktaj sunpaneloj [8].

La suda fasado konsistos el duobla vando el travideblaj ondoladoj inter kiuj vespere estos enblovitaj korkokugletoj por igi ĝin izoliva [9]. Matene la aerfluo estos inversita por enlasi la sunradiadon stokante la korkokugletojn en la tehnika ĉambro norde. La sunenergio vintre eniras ĝis la fundo, kaj somere atingas nur la antaŭan parton ebligante konservi komfortan etoson en ĉiuj sezonoj [10]. Ventumilo ŝovos la varmecon el la supro de la vitrodomo kiam ĝi superas iun difinitan temperaturon [11] al tavolo da ŝtonoj sub la konstruaĵo por redoni varmecon nokte [12].

La vizitgalerio, alirebla al handikapuloj, se eble kun travidebla planko, utilos por klarigi la funkciadon de la tuto [13]. Tie troviĝos plantsekiĝilo



<http://floreve.asso.free.fr/>



PEĈJO KEREMPUH EN GOOGLE

Multaj uzantoj de Guglo (Google) surpriziĝis la 7-an de julio, rimarkinte en la ĉefpaĝo la ilustraĵon de Peĉjo Kerempuh (kroatinge: *Petrica Kerempuh*). Ĝi aperis precize je la naskiĝtago de la fama kroata verkisto Miroslav Krleža, unu el la plej grandaj nomoj de kroata literaturo de la 20-a jarcento.

Krleža produktis vere imponan verkaron, kiu inkluzivas inter 50 kaj 80 volumojn. Li verkis romanojn, rakontojn, dramojn kaj poemojn, sed ankaŭ marĝenajn literaturajn ĝenrojn: enciklopediajn skizojn, korespondaĵojn pri diversaj temoj, vojaĝpriskribojn. La plej fruaj influoj en lia verkaro troveblas en la skandinaviaj dramoj de Ibsen kaj Strindberg kaj filozofio de Nietzsche, al kiuj poste aldoniĝis prozaj kaj poeziaj verkoj de Kraus, Rilke kaj Proust. Kvankam Krleža ne aprecis la verkojn de Dostojevski, en la dialogoj de liaj romanoj kaj dramoj videblas la influo de tiu rusa verkisto, samkiel ekspresionismo kaj impresionismo dominintaj en la germanlingvaj literaturoj de

la unuaj du jardekoj de la 20-a jarcento.

Krleža devenis el burĝa zagreba familio. Gimnazon li finis en Zagrebo kaj poste lernis en armeaj institutoj en Pécs kaj Budapeŝto, de kie li revenis en 1913 kaj komencis labori en gazetredakcioj, aperigante siajn unuajn literaturajn verkojn kaj fariĝinte profesia verkisto. Li redaktis plurajn literaturajn revuojn (Plamen, Književna republika, Danas, Peĉat).

La plej grava verko de Miroslav Krleža estas "Baladoj de Peĉjo Kerempuh". Peĉjo Kerempuh estas popola ŝercemulo kaj spritulo, kiu el la popola rakonta tradicio eniris ankaŭ skriban literaturon ĉe pluraj verkistoj. Kerempuh similas heroojn de popola tradicio en aliaj eŭropaj literaturoj, ekzemple la germanan Till Strigospegulo (=Eulenspiegel). Li vagas tra la mondo kaj ribelas kontraŭ homa stulteco, abunde primokante ĝin.

La baladoj estas verkitaj en la kajkava dialekto, respektive en la miksaĵo de la Krleža-a germanigita kajkava, kombine



Miroslav Krleža
(1893 - 1981)

kun la zagreba kaj nordokcidenta kajkavaj dialektoj de la regiono Zagorje. La baladoj estas verkitaj en 1936 kaj ilia ĉefa temo estas la subpremado de la popolo kaj ĝia deziro travivi. La verko estis presita en Ljubljana (Slovenio), ĉar la aŭtoro ne trovis en Kroatio eldoniston pretan eldoni la verkon en kiu evidentiĝis konscio pri socia maljusto al simpla popolo. La verko estas ankaŭ ribelo kontraŭ formorto de la kajkava dialekto, post akcepto de la ŝtokava dialekto kiel norma lingvo.

En Esperanton la baladoj estas nur fragmente tradukitaj. Ni represas unu el ili, kiu aperis en "Koko" 5(11)/1990.

[14] ĝermilo por manĝeblaj grenoj [15].

Je teretaĝo troviĝos kompoŝtilo destinita al kreskigo de aromaj kaj kondimentaj plantoj, de malnovaj legomoj, dank' al la varmeco kaj la karbona dioksido produktitaj de la fermentado de ĉevala sterko stokita en moveblaj traboritaj bareloj [16]. Post aera fermentado en la kompoŝtilo, la barelo estos mergita en la digestilon kaj dronita en la fermentolikvajon por produkti bruleblan metangason [17]. Tiu biogaso utilos por la hejtado kaj la produktado de elektro

en kombinita ciklosistemo (kungenerado). Karbona dioksido estos eligita el la biogaso per akva lavado kaj amoniako estos eltirita el la fermentolikvaĵo por nutri la spirulinon en baseno kiun arhimeda ŝraŭbo malrapide movos por aktivigi la produktadon [18]. Fiŝbreda baseno povos uzi parton de la produktado de algetoj por fermi la cirkon de la integrita sistemo [19].

Tradukis: Arno Lagrange

ESPERANTISTOJ ANKAŬ DIALEKTE ELSTARAS

 Redakcia kompilo

Jela Maresić
Vladimir Miholek

OPIS I
RJEČNIK
ĐURĐEVEČKOGA GOVORA



Gradska knjižnica Đurđevac

 Ivan Pleadin

La 17-a de junio ĉi-jare estis grava dato por dialekto de la nordkroata urbeto Đurđevac. Tiutage, je la 19h00, en la salono de la kompanio INA, okazis publika prezento de la *“Biblio de la dialekto de Đurđevac”*. Per tiaj vortoj la direktorino de Urba biblioteko, s-ino Ankica Šabarić, karakterizis la libregon **“Priskribo kaj vortaro de la idomo de Đurđevac”**, kies eldonon entreprenis la Urba biblioteko.

La libro havas pli ol 900 paĝojn, kaj ĝi prezentas raran eldonan projekton. Enhavante la rezultojn de la multjara esplora laboro kaj notado de la kajkava dialekto de Đurđevac, ĝi prezentas ĉionampleksan analizan verkon, kiun kune pretigis la origina

parolanto de la idiomo Vladimir Miholek, kaj sciencistino d-rino Jela Maresić. En la realo malofte okazas tia kunlaboro de fakuloj kaj praktikuloj, kaj ĝuste pro tio la rezulto de ilia komuna laboro estas tiom valora.

Eble tiu ĉi evento ne aparte interesus la esperantistojn, se ne ekzistus kelkaj komunaj elementoj. Jam delonge estas konate, ke Esperanto ne celas neniiĝi aliajn lingvojn, sed ĝuste inverse - pristudi kaj konservi, respektive samvalorigi ĉiujn lingvojn kaj dialektojn, senkonsidere pri ilia graveco, grandeco aŭ nombro de parolantoj. Ekzistis eldiro, ke “en sia medio oni parolu respektivan dialekton, en sia lando la norman lingvon kaj por rilatoj kun aliaj nacioj oni





uzu Esperanton". Malfacile estus kredi, ke la lanĉinto de la laboro pri ĉi-tiu libro, Vladimir Miholek, prenis el Esperanto la ideon pri konservado de propra dialekto, sed eble lia okupiĝo pri Esperanto akcentis tiun bezonon. Kvankam nuntempe li ne estas aktiva esperantisto, li estis kursano de la unua Esperanto-kurso en Durdevac en 1977, kunfondinto de Esperanto-societo "Koko" kaj multjara ĝia membro. Dum parto de sia membrecio li estis kluba bibliotekisto.

Vladimir Miholek ekhavis la ideon pri kompilado de dialekta vortaro antaŭ kvaronjarcento. Dum pli ol du pasintaj jardekoj li kolektis pli ol 15.000 vortojn. La intereson pri la dialekto vekis ĉe li lia avino Roza, kies dialekta vortprovizo estis nekutime riĉa. Unue Vladimir kolektis la dialektajn proverbojn kaj sentencojn, kiuj ankaŭ trovis lokon en la fino de la libro. Ekde 1988 li komencis noti la aŭditan, komence sen difinita celo, sed kun reala konscio, ke nur notita surpapere la rara kaj iomete eksmodiĝanta kaj ŝanĝiĝanta dialekta lingvaĵo restos konservita. Multaj vortoj kolektitaj instigis lin ankaŭ okupiĝi pri verkado de

dialekta poezio. En tiu kampo li havis sufiĉe gravajn sukcesojn: kvar eldonitajn poemarojn kaj partoprenon en pluraj kajkavaj dialektaj poeziaj recitadaranĝoj. Per tio li konsciigis ankaŭ pri senrevena malaperado de dialektoj, kaj en li enradikiĝis la ideo fari ĉion laŭ siaj eblecoj por konservi ilin. Komence la fonto de liaj notoj estis nur la avino Roza, poste familianoj kaj amikoj, kaj fine la intereso cikle vastiĝis al ĉiuj personoj kun kiuj li kontaktis, aparte al maljunaj homoj kiuj ankoraŭ uzis la originajn variantojn de la dialekto, sen altruditaj elementoj de la norma kroata lingvo. Estas netakseble granda tempo- kaj laborinvesto de Vladimir en tiun projekton, kiu ankaŭ en la fakulaj rondoj estas taksata epokfara.

Interesaĵo de la laboro de Vladimir Miholek estas ankaŭ ke preskaŭ neniu sciis pri lia okupiĝo - li laboris sen troa bruo kaj pompo. Pri lia laboro iom pli detale sciis nur kelkaj homoj, inter kiuj certe troviĝas ankoraŭ unu konata kroata esperantisto - doktoro Velimir Piškorec el la Filozofia fakultato de Zagrebo. Nemirinde, ĉar ankaŭ lia intereso pri Esperanto

kreskis en la loka klubo "Koko" en Durdevac, kies membro ankaŭ li estis. Respektive, la konateco de Vladimir Miholek kaj la lingva-dialekta fakulino Jela Maresić, certe gravan rolon havis Velimir Piškorec, kiu kune kun doktorino Mira Menac Mihalić recenzis la libron.

La fakan revizion de la materialo kompilita far Vladimir Miholek faris doktorino Jela Maresić, direktorino de Instituto pri lingvistiko de Kroata akademio de sciencoj kaj arto, kiu dum tri jaroj ordigis la materialon kaj signis la akcentojn. La ĉefa diferenco inter la norma kroata lingvo kaj la kajkava dilakto de Durdevac troviĝas en la akcenta sistemo movita al la vortofino, al la du lastaj silaboj, kaj la uzado de ses vokaloj, per kio ĝi diferencigas de la ĉirkaŭaj kajkavaj idiomoj.

La libro estas iaspeca gramatiko (priskribo) de la idiomo, kies mezan (sed la plej grandan) parton konsistigas la vortaro.


 Ivan Špoljarec

 Darko Ban

**Profesoro
Josip Velebit
(1911-2000)**

La 14-an de junio en la Mezlernejo Vrbovec estis organizita kunveno honore al la 100-jara naskiĝdatreveno de profesoro Josip Velebit. La komencon de la solenaĵo markis la inspira parolado de la urbestro de Vrbovec, s-ro Vladimir Bregović, kiu malkovris la memortabulon al profesoro Velebit, starantan super la ĉefa enirejo en la lernejan konstruaĵon.

100-a NASKIĜDATREVENO DE PROFESORO VELEBIT



Memortabulo al profesoro Josip Velebit super la ĉefa enirejo de Mezlernejo Vrbovec, kie li postenis - la nova ZEO en Kroatio, starigita okaze de la 100-a datreveno de lia naskiĝo.

 Željko Gubijan



Profesoro Josip Velebit, poeto, tradukisto kaj esperantisto, vivis kaj laboris en Vrbovec ekde la jaro 1965 ĝis sia morto en 2000. Li naskiĝis la 20-an de junio 1911 en Rijeka, kaj kiel la unua profesoro de la latina kaj germana lingvoj li laboris dise tra Kroatio: en Slavonski Brod, Osijek, Beli Manastir, Zaprešić, Križevci kaj Vrbovec. En Vrbovec li ekpostenis kiel profesoro de la kroata kaj germana lingvoj en la Elementa lernejo, kaj du jarojn poste, kiam ekfunkciis la Gimnazio en Vrbovec, profesoro Velebit daŭrigis sian profesoran karieron en la Gimnazio, fariĝinte poste eĉ ĝia direktoro. En la jaro 1972 profesoro Velebit pensiĝis, sed ĝis sia morto li daŭre okupiĝis pri tradukado, plejparte al Esperanto, sed ankaŭ al la kroata el lingvoj germana, hungara, bulgara, rusa, estona, slovena kaj makedona. Lian vivon, de la komenco ĝis la lastaj vivojaroj, prezentis la iama direktoro de la Gimnazio Vrbovec, profesoro Blažutić. Profesorino de la kroata lingvo, s-ino Dlaka, prezentis lian literaturan laboron, sed la plej rimarkindan programeron prezentis la direktorino de Popola malferma universitato, profesorino Prijatelj, projekciante fotojn pri lia vivo. S-ro Ivan Špoljarec, reprezentanto de Kroata Esperanto-Ligo, retrorigardis al la historio de Esperanto en Vrbovec kaj parolis pri la kunlaboro de profesoro Velebit kun la Esperanto-societo "Granda Espero". Profesorino Spomenka Štimec konigis al la ĉeestintoj la ampleksan verkaron de profesoro Velebit en Esperanto, kiu aperadis en diversaj literaturaj gazetoj kaj antologioj tra la mondo.



Ĉeestintoj de la kunveno omaĝe al profesoro Velebit en Vrbovec.

 *Željko Gubijan*



La internacia jaro de arbaroj

Kun la intenco plialtigi la konscion pri konservebla mastrumado, protekto kaj evoluiĝo de ĉiuj specoj de arbaroj, je la iniciato de Respubliko Kroatio, membro de UNFF (Forumo pri arbaroj de Unuiĝintaj Nacioj), tegmenta internacia organizo pri forstokulturo, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2011 internacia jaro de arbaroj. Dum la festado de Internacia jaro de arbaroj Respubliko Kroatio akcentas la konserveblan mastrumadon en arbaroj kiel la necesegan fundamenton de ĉiuj homaj aktivecoj.

Arbaroj estas “gardantoj de la naturo”. Iliaj ĝenerale utilaj funkcioj respegulas protekton de grundo kontraŭ erozio, torentoj kaj inundoj. Fortas ilia influo al akvoreĝimo kaj hidroenergia sistemo, al grundofekundeco kaj determinado de agrikultura produktado, influo al klimato, protekto kaj progresigo de hommedio, produktado de oksigeno kaj purigo de la atmosfero, influo al beleco de pejzaĝo, kreado de favoraj kondiĉoj por resaniĝo, ripozo kaj distro, por evoluo de turismo kaj ĉasado. Arbaraj ekosistemoj ofte estas saturitaj per diversaj setlejoj, kio pligrandigas ilian biologian diversecon (fluantaj akvoj, fontoj, marĉoj, sfagno, arbaraj randoj, arbaraj maldensejoj, malnova arbo, sekiginta arbo, putra trunko ktp), kaj ĉesto de granda nombro de protektitaj kaj/aŭ endanĝerigitaj planto- kaj besto-specioj kaj diversaj specoj de fungoj. Krome, kroataj arbaroj, diference de multaj aliaj eŭropaj arbaroj estas naturaj, kio nur konfirmas la esceptan kontribuon de arbaroj al kompleta biologia diverseco de Kroatio.



KIO KOLERIGAS LA ESTRARANOJN?

(Kial mi forlasis la jarkunvenon de KEL?)

 Josip Pleadin

La 16-an de junio okazis jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo. Mi proteste forlasis ĝin, sed al mi ŝajnas, ke malmultaj ĉeestintoj komprenis la fonon de tiu ago kaj de miaj kritikoj direktitaj unuavice al la Estraro de KEL.

Se post tridekjara agado por Esperanto, iu, kiu samtempe estas membro de la Estraro de KEL kiel mi, kritikis ion, ĉu ne estas prudenta demando: kial li faras tion? Ĉu ne estus almenaŭ konsilinde priesplori ties asertojn? Laŭ la sinteno de plej multaj el la asembleanoj de KEL, tian demandon neniu starigis al si mem.

La Estraro de KEL estas organo kiu gvidas negocojn de KEL. Sed, ĝi estas respondeca al siaj membroj kaj aparte al la Asembleo de KEL. Dum tri jaroj mi postulis, ke la funkciado de la Estraro estu transparenta, sed tio ne okazas. Kaj kion entute signifas "transparenta"? Transparenta ne estas la raporto kiun la Estraro donas al ni nur por voĉdoni por ĝi, sen rajto ion ajn demandi. Transparentaj ne estas ankaŭ la financoj pri kiuj Kontrola komitato ne havas unuecan opinionon. Transparenta ne estas la funkciado en kiu ekzistas sekretaj traktadoj kaj dokumentoj, kontraktoj kaj planoj.

En la jarkunveno ni aŭdis la aserton, ke "ni fidis la Estraron, ĉar ni elektis ĝin". Kvankam tiun aserton eldiris mia tre bona amiko Antun Kovač, mi ne konsentas kun li. La fido pri kiu li parolas, limiĝas nur al rajto reprezentanti nin, sed ne rajtigas la Estraron kaŝi aŭ eviti respondojn kaj labori sen nia kontrolo. Senlima fido al elektitaj reprezentantoj gvidas al misuzo

de funkcio. Mi ne volas fidi, se mi devas sendemande voĉdoni por io. Ĉiu kiu devas voĉdoni havas la rajton antaŭ voĉdonado ricevi precizan kaj detalan respondon al siaj demandoj. Se respondoj estas rifuzataj al la demandinto dum jaroj, starigas memkomprenebla demando: "Kial?" Se la funkciado de KEL estas en laŭleĝe preskribitaj kadroj, ne devas ekzisti sekretaj raportoj kaj kontraktoj. Kaj, cetere, kiu rajtigis la Estraron subskribi sekretajn kontraktojn, eĉ se tute bonintence? La celo ne pravigas la rimedon!

Jam plurfoje mi postulis transparentan prezenton de ĉiuj kostoj pagitaj por la aĉeto de Vodnikova. Tion rajtas scii ĉiu kiu donis eĉ unu kunaon kiel sian helpon por repago de la kredito por Vodnikova. La respondo rifuzita eĉ plurfoje dum pasintaj jarkunvenoj!

En la kunsido de la Estraro okazinta la 9-an de junio mi ripetis miajn demandojn ĉefe pri financaj raportoj, respektive pri la raporto rilatanta la t.n. EU-projekton, en kiu temas pri grandaj monsumoj. Mi volis scii, kiu ricevis kiom da mono kaj por kia laboro. Ĉar tiuj informoj estis rifuzitaj al mi, mi retiris la demandojn, pro la akuzo ke mi obstrukcias okazigon de la jarkunveno. Mi opiniis, ke tiun raporton devos akcepti ankaŭ la Asembleo, sed, jen surprizo: en la jarkunveno tiu raporto absolute ne estis menciita! Tio eksplodigis min, ĉar evidente oni volis eviti diskuton pri malagrablaj temoj.

Mian diskuton anticipis la diskuto de Srećko Radulović el Sisak, kiu atentigis pri pluraj malregulaĵoj, interalie pri la malvalida raporto de Kontrola

komitato. La statuto de KEL postulas, ke la Kontrola komitato konsistu el tri personoj, dum en la jarkunveno la komitato estis nur dupersona, kaj unu el la du membroj eĉ havis gravajn riproĉojn pri la laboro de KEL, respektive pri financaj aferoj.

KEL ne estas privata firmao de kelkaj personoj kiuj gvidas ĝin, kaj sekve nenio povas esti kaŝita pro "pli altaj celoj", maskita kiel "negocsekreto". Kaj mi ne estas la sola kiu postulas respondojn. Je niaj demandoj la vicprezidanto Vjekoslav Morankić diras, ke oni "ne povas respondi al ĉiu demando venanta elstrate", kaj la protokolo de la jarkunveno eĉ enhavas liajn vortojn: "Vjekoslav Morankić klarigas ke la informojn kiujn postulas Pleadin, oni ne publikigu. KEL ne disdonas tra Kroatio presitajn materialojn pri tio kiomajn honorariojn ricevis P.D kaj kiomajn M.D." Sinjoro vicprezidanto, kiu rajtigas vin respondi tiel al via kolego el la Estraro? Vi forgesas, ke mi estas plenrajta membro de la Estraro, kaj ke mi ne postulis publikigon de tiuj informoj, sed konigon de ili al ĉiuj membroj de la Estraro.

Anstataŭ ricevi la respondojn kiujn mi postulis, la prezidantino de KEL provis per kalumnioj kaj publikaj ofendoj (pri tio legu la juran klarigon en alia loko ĉi-numere!) malhonorigi min kaj provi eviti la respondojn. Ĉu ŝi sukcesis? Dependas de vi kiuj ĉeestis la jarkunvenon, kaj de tio ĉu vi detale reripensos kion mi diris kaj skribis. Se vi oferas la veron por trankvila dormo, vi devos tion fari kaj voĉdoni sen mi. "Zagreba esperantisto" kiel malferma periodaĵo, volonte publikigos viajn opiniojn kaj diskutojn pri tiu ĉi temo.



NERIPETEBLA TRAVIVAĴO

 Jozo Lovrić

 Davor Grgat

Kroataj esperantistoj okazigis sian 9-an kongreson la 14-an kaj 15-an de majo 2011 en Bjelovar, omaĝante la 100-jariĝon de la traduko de "La trezoro de l' orajĵisto". La faman verkon de kroata verkisto August Senoa tradukis kaj en 1911 eldonis Fran Kolar - Krom (1877-1927), la fondinto de la unua Esperanto-societo en Bjelovar. Tiu verko estas konsiderata la unua libroforma beletraĵo el la kroata aperinta en Esperanto. La longa tradicio de Esperanto en Bjelovar komenciĝis en 1909 kaj la societo estis malfondita en 1992. Tamen, en la urbo ekzistas konsiderinda grupo da esperantistoj, kiuj formis la LKK-on kaj organizis la plej kvalitan el ĉiuj ĝisnunaj kongresoj de kroataj esperantistoj. La sukceso de la kongreso estis ebla ne nur pro la tradicio de Esperanto en la urbo, sed ankaŭ pro la forta financa kaj morala subteno de pluraj lokaj kaj regionaj instancoj, kio en malfavoraj ekonomiaj kondiĉoj agrable surprizis ĉiujn.


Partoprenis preskaŭ 200 kongresanoj el ĉiuj partoj de Kroatio kaj reprezentantoj el 9 aliaj landoj. La subtenon al la kongreso donis la bjelovara urbestro s-ro Antun Koruŝec kaj la departamentestro s-ro Miroslav Čačija. La urbestro persone estis la kongresano n-ro 1, li mem partoprenis la aranĝon, malfermis la kongreson kaj ankaŭ la ekspozicion "Esperanto en Kroatio" en la Urba muzeo, la 13-an de majo.

La kongreson anticipis Esperanto-kurso gvidita de Josip Pleadin, kiu estis la idea gvidanto kaj motoro de la kongreso. La tre aktivan 10-membran LKK-on gvidis la prezidantino Ljerka Stilinović. En la prepara periodo estis organizita la ekspozicio "Esperanto - literatura lingvo" en la Popola biblioteko "Petar Preradović" kaj distribuitaj 5000 plenkoloraj reklamiloj pri Esperanto en ĉiuj mezlernejoj de Bjelovar.


La oficiala kongresa programo okazis la 14-an de majo en la urba Kulturdomo. La himnojn (nacian kaj Esperantan) prezentis la loka kantisto Dubravko Kovačević, festparolis la prezidantino de Kroata Esperanto-Ligo Judita Rey Hudeček kaj siajn salutojn al la kongreso direktis reprezentantoj de ĉiuj partoprenintaj landoj kaj Esperanto-societoj el Kroatio. Pri la eŭrop-unia temo parolis Zlatko Tišljar, la sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio, kaj la prezidantoj de Kroata Esperanto-Ligo (Judita Rey Hudeček) kaj Hungaria Esperanto-Asocio (Imre Szabó) subskribis Interkonsento pri partnera kunlaboro inter la du landaj asocioj.

En la kultura parto de la programo prezentigis la bjelovaraj kultur-artaj societoj "Golub" (per kroataj kantoj en Esperanto) kaj "Češka obec" (per ĉeĥaj kantoj kaj dancoj). Membroj de Drama grupo de Ekonomia kaj burteknika lernejo el Bjelovar en Esperanto prezentis teatraĵeton inspiritiran per "La trezoro de l' orajĵisto" adaptitan far ilia profesoro Marko Dragičević, kaj ĉapitron el la teatraĵo "Dek tagoj de kapitano Postnikov" ludis Saša Pilipović (el Kragujevac) kaj Mičo Vrhovac (el Banja Luka). Poezion en Esperanto recitis la aktorino Vida Jerman kaj mezlernejanino Dijana Ramljak, kantis en Esperanto la konata operkantisto Neven Mrzlečki kaj gitar- kaj trombon-ludis muziklernantoj Fran Derda kaj Eugen Pranjić. En la programo estis prezentitaj eĉ tri novaj libroj: kroata eldono de "Sklavoj de Dio" de la hungara verkisto Géza Gárdonyi (tradukita pere de Esperanta versio far Aleksandar Kocian), "La kapreolido Pirgo" (porinfana romaneto de la kroata verkistino Anđelka Martić, kiu mem ĉeestis la solenaĵon; la tradukon faris Josipa Katunar) kaj "La vivo de Damoru" (Esperantlingva traduko de bengala verko de Trailokyanath Mukhopadhyay, tradukita far Malasree Dasgupta). La librojn prezentis Zdravko Seleš kaj Spomenka Štimatec. Post la programo okazis komuna vizitado de la ekspozicio "Esperanto en Kroatio" en la Urba muzeo (kiu plejparte uzis la materialon de Dokumenta Esperanto-Centro el Durdevac, la nacia historia kolekto oficiale fondita en 2010). En aparta niĉo de la Urba muzeo estis prezentita ankaŭ foto-ekspozicio de tri esperantistoj, aranĝita plejparte dank' al Beroslav Rubčić. Post tio okazis komuna fotado kaj komuna tagmanĝo kun dancmuziko ĝis vesperaj horoj en la restoracio "Golub".

Delegacio de la LKK metis florkronon ankaŭ sur la tombon de Vilim Polašek, veterana bjelovara

- 
- ① La kongresejo.
 - ② Salutparolado de la urbestro Antun Koruŝec.
 - ③ Salutparolado de la LKK-prezidantino, Ljerka Stilinović.
 - ④ Kongresa salono dum la kantado de himnoj.
 - ⑤ La akceptejo.
 - ⑥ Reprezentantoj de kroataj Esperanto-societoj salutas la kongreson.
 - ⑦ Reprezentantoj de KEL (Judita Rey Hudeček) kaj HEA (Imre Szabó post subskribado de la Interkonsento pri partnera kunlaboro.




9. kongres hrvatskih esperantista
9-a kongreso de kroataj esperantistoj
 BJELOVAR 2011

Komuna foto (supre) kaj parto da ekskursanoj en Veliki Grđevac (malsupre).



- ① Veterana esperantisto Alesandar Kocian el Osijek.
- ② Gitarludas Eugen Pranjić.
- ③ La kontenta vizaĝo de la LKK-prezidantino, Ljerka Stilinović dum la programo.
- ④ Saša Pilipović kaj Mićo Vrhovac en la teatraĵo "Dek tagoj de kapitano Postnikov.."
- ⑤ LKK sur la scenejo.
- ⑥ La virina koruso de Kulturarta societo "Golub".
- ⑦ Malfermo de la ekspozicio "Esperanto en Kroatio" (de maldekstre staras: Josip Pleadin, Spomenka Štimec, la direktoro de la muzeo Mladen Medar kaj la urbestro Antun Korušec.



esperantisto, kiu estas la plej merita persono por longa kaj fruktodona historio de Esperanto en ĉi tiu urbo.

La 15-an de majo okazis kongresa ekskurso al Daruvar kaj Veliki Grdevac, kie estis vizitita la "Centro de Mato Lovrak" (porinfana verkisto, kies verko "La kamaradaro de Petro Nodeto" estas

tradukita ankaŭ al Esperanto). La ekskurso finiĝis per mallonga folkloro programo en la Distra kaj sporta centro "Kukavica".

Pri la kongreso raportis pluraj portaloj, gazetoj kaj televido. Estis eldonita speciala filatela koverto kaj la 14-an de majo funkciis speciala kongresa stampo en la poŝtoficejo de Bjelovar.



9. kongres
hrvatskih esperantista
9-a kongreso
de kroataj esperantistoj



Ljerka Stilinović
prezidantino

LOKA KONGRESA KOMITATO



Franjo Forjan



Grozdana Grubišić-Popović



Marija Horvatić-Kapelac



Nenad Margetić



Josip Pleadin



Zdenka Polašek



Berislav Rubčić



Željko Saks



Spomenka Štimec



Por la 9-a kongreso en Bjelovar la firmao "Čvor" eldonis specialan numeron de "Bjelovara gvidilo", kiu estas parte Esperantlingva: ĝi enhavas historieton pri Esperanto en la urbo, kongresan programon, historion de la urbo kaj kuirreceptojn en Esperanto. La eldonon iniciatis Franjo Forjan, membro de la LKK, kaj redaktis Vesna Grandverger. Eldonkvanto: 2000 ekzempleroj.

- ① Vida Jerman recitas poezion.
- ② Kantas Neven Mrzlečki.
- ③ Mezlernejanino Dijana Ramljak recitas poezion.
- ④ Ĝi Esperanto kantas Dubravko Kovačević.
- ⑤ Teatraĵo de bjelovaraj mezlernejanoj.
- ⑥ Dancantoj de kulturarta societo "Češka obec".
- ⑦ La verkistino Anđelka Martić (la unua de dekstre) dum la prezento de "La kapreolido Pirgo".

①



④



②



⑤



⑥



③



⑦

TUTPOLLANDA ESPERANTO-KONGRESO

Tutpollanda Esperanto-Kongreso okazis en pola urbo Nowy Sącz de la 30-a de aprilo ĝis 7a de majo 2011. Kongresa temo: CIVITANA AKTIVECO de ESPERANTISTOJ. Partoprenis 169 personoj, kvankam multaj el ili nur parte.

La Kongreso en Nowy Sącz estis okazo, por festi eĉ 3 lokajn jubileojn: 105 jarojn de Esperanto en la urbo (oni skribis en tiama urba gazeto en 1906, ke aperis "esperantistoj" en Nowy Sącz), 105 jarojn de historio de la asocia gazeto "Pola Esperantisto", kiu jam pli ol 3 jarojn estas redaktata kaj presata en Nowy Sącz, kaj 55 jarojn de revivigo de la Esperanto-Klubo post la dua monda milito. Do la programo estis varia kaj riĉa. La prelegprogramojn gvidis Iłona Koutny, Zbigniew Galor, Lidia Ligęza, Roman Dobrzyński, Tomasz Chmielik, kaj eksterlandaj gastoj Zsófia Kóródy, Zlatko Tišljar, Petro Baláž. Ili realigis temojn pri edukado, instruado, informado, monakirado, partnereca kunlaboro internacia kaj inter regionoj, pri propagando eksteren. Eĉ trifoje oni elektis la rolon de filmo por Esperanto dum la programoj de Roman Dobrzyński, Przemek Wierzbowski, Andrzej Sochacki. Pri uzo de modernaj iloj por informado, varbado, instruado kaj ĝenerale en la Esperanto-agado, instruis nin Petro Baláž, konsilojn pri gvidado de Esperantaj-kursoj, kreado de gazetartikoloj preparolis Stano Marček, kaj Zlatko Tišljar rakontis pri novaj partneraj projektoj de financado por Esperantaj organizaĵoj kaj – antaŭ la granda manifestacio kun kantado de Eŭropa Himno – li prelegis pri la ideo de himno en neŭtrala lingvo, kaj el la granda ekrano salutis nin kaj deziris sukceson (en du lingvoj, pola kaj Esperanto) eŭrodelegitino Margareta Handzlik, senpere el Eŭropa Parlamento. Eksterordinare okazis manifestacio sur la centra urba placo ĉe urbodomo, kien venis korusoj kaj soldata orkestro, reprezentanta Karpatan Grupon de Landlimaj Gardistoj. Salutis nin urbestro Bożena Jawor kaj nome de EEU – Zlatko Tišljar. Junularo el liceoj kun flagoj de uniaj landoj, montris dum la spektaklo "naskigon" de 12 oraj eŭropaj steloj. Korusoj kantis Himnon de Eŭropo laŭ vortoj de Umberto Brocatelli en Esperanto kaj pole. La Kongreso allogis ankaŭ eksterlandajn artistojn, kiel Manuel Rovere kantanta "Duonvoĉe... tutkore" kaj JOMO.

Polajn artistojn reprezentis Joanna A. Clifford, memorigante la repertuaron de Ada Sari el la UK 1912 en Krakovo, kaj prezentante recitalon de klasika muziko kun orgena akompano, kaj Anna Buda kun operetaj kaj muzikalaj kantoj kun ensemblo "Romantikaj". Varsoviaj rememorigis malnovajn recitalojn de fama en 1970-80aj jaroj dueto "Konsonanco" gvidata de Remigiusz Kossakowski.

Valoraj kaj altnivelaj estis la programoj poezia kaj teatra de Lidia Ligęza pri "Magio de Amo", de Krystyna Dulak-Kulej prezentanta nove eldonitan

 Andrzej Sochacki

dulingvan libron kun propraj kaj tradukitaj poemoj. Majstre preparis la spektaklon "Ludoviko Lazaro" Jerzy Handzlik, kaj pollingve prezentis la monodramon de Carlo Migliucci "Doktor Esperanto" Helena Biskup.

Du kvizojn gvidis Marian Zdankowski - la unuan pri Esperanto kaj la duan pri Sandecia (Sonĉa) Regiono. En la konkursoj venkis Przemek Wierzbowski pri Esperanto-movado kaj Nina Pietuchowska - pri la regiono gastiganta la kongresanojn. Ambaŭ venkintoj ricevis senpagan partoprenon en la septembra ekskurso al Eŭropa Parlamento.

La plej grava arta atingo de TEK iĝis la premiera spektaklo de "Roma Triptiko", preparita de Poezia Scenejo de la teatro aganta ĉe Urba Kulturcentro. La reĝisoro de la spektaklo - Janusz Michalik ankaŭ recitis, kaj montriĝis alta nivelo de artistoj, belege deklamantaj la filozofian poezion de la benita Johano Paŭlo la Dua kun bela fono de freskoj de Michelangelo. Akompanis kamerala muziko de ensemblo "Sonatina 2". Al Urbodomo invitis nin la urbestro por koncerto kadre de "Festivalo de eltrovita muziko", kaj regalis nin per jubilea, grandega torto por 200 personoj.

Urba Kulturcentro ne nur estis tre komforta kongresejo, sed dum monatoj preparis agantajn tie 6 ensemblojn infanajn kaj junularajn por la kongresa programo. Konsultanto de la teatra programo estis Jolanta Kieres, pri la kantado zorgis H. Komar. Rezulto de tio iĝis la Esperantlingva repertuaro de "Brathanki" (tradukita de Danuta Kowalska), kantita de junaj knabinoj, "Quantanamera" kaj aliaj kantoj ŝatataj de esperantistoj. La plej junaj infanoj prezentis kurtuŝe "La Etan Princon"...

Folkloro ensemblo SADECZANIE dancis kun la kongresanoj post la spektaklo. Oni regalis la gastojn jam de la unua tago – dum Interkona Vespero, dum koncerto ĉe la urbestro, dum regiona bankedo de estro de Distrikto kaj dum la kradrostado ĉe kampara fajrujo ...

Dum la lasta tago okazis Ĝenerala Kunsido de PEA-delegitoj. Alvenis ankaŭ 27 delegitoj. Estis elektita nova Ĉefa Estraro de PEA por la periodo 2011 - 2014. PEA-n gvidos Arkadiusz Zychewicz kiel prezidanto kun la jena teamo: Paweł Fischer - Kotowski, Agnieszka Mozer, Zofia Śmistek, Anna, Władysława Kujaczyńska, Mirosława Mazur, Barbara Pietrzak. Delegitoj kaj la nova Estraro de PEA kore dankis al H. Komar, la ĝisnuna prezidantino kaj al la iama Estraro. Halina Komar montris kiel oni povus organizi modelan kongreson kaj modelan Esperanto-aranĝon.



FRAGMENTO EL “BALADOJ DE PEĈJO KEREMPUH”

 Miroslav Krleža

EN TORTURADO (*Na mukah*)

En torturado akirita kaj devigita konfeso de stubicanaj ribelantoj Ellias Gregoricz kaj Michael Gossetich antaŭ sinjoro reĝa juĝisto *iuris doctor* Johan Huetstocker kiel ekzamenisto, okazinta en ĉefurbo Vieno, la 14-an de majo de jaro sinjora 1573.

Sang', sala, servutula,
stubicana sang',
la nigra, ruĝega,
fetora, densa sang',
kial ĝi fluas surda, grasa, blinda,
terure tepida sang'?

Tri murdistoj, tri maskitoj ŝvabaj,
kiel karnavaluloj sangaj tri ...
En rip' unu najlo, en karno najloj tridek tri,
sang' bubale blekas, kiel hund' rabia bojas,
sang' damnas, vomas, freneze ridadas ...
En sango nigro mankas,
nenio, neniu, eĉ ombra ne,
en hispanbotoj kiel lulile oni dormas ...

Monaho, frandemulo, ŝangemulo kaj sanglekanto,
Artik- kaj artikol-ĉefmajstro, preskribanto,
monĉasanto kaj infera intriganto,
ŝtata juĝisto, sinjoro Huetstocker, doktor' Johan'
orplumulo viena, nek kuirita nek panumita,
hispan-fingropremilon, najlon subungen igi,
en vundan orelon da peĉ' kulerojn tri,
nadlan ringon en ŝiritan naztruon meti,
sur ŝnuro, sub hakil' en ĉemiz' sulfura
stubicanojn peklas per paragraf' nura ...
Antaŭ Justo en la viena buĉejo
voĉ' mortas en obskura biertrinkejo:
l' juĝist' homon bakas kvazaŭ en panejo ...

Doktoroj, sinjoroj, lacpaŝantoj kaj sanglekantoj,
de just' kaj rajto leĝaj ŝanĝigantoj,
ekzekutistoj en veluro kaj elprovitaj ruzuloj,
kion volas de mi la ruĝaj maskportuloj,
kial akriĝas klingon maskuloj, falĉantoj - ?

Poŝtoŝtelistoj damnaj! En sanga sekciado,
mi juras je dio en mortem-sopirado:
mi ne estas trompanto, flatanto, mensoganto,
neniam idolano, herezulo kaj nekredanto -
Kion ja ili volas?
Kien fluas sang'?

Febranta, varma, koagulita,
kiel ink' malpura sang'?

Ĝi krias, ĝemas, hurlas, “sen sang' ofer' ne estas”,
kiel tintil' sur fajro sange sango tintas;
frapas, veas, sonoras, tamburas, tondras,
nin hakas, fendas, mordas, suĉas kaj voras,
sanga krucumo en sangumita vojo,
sang' lavas de mi vundojn en honto kaj moko,
sang' kalvaria estas sola eliro de ĉi-loko ...

Sinjor' Huetstocker, pro vundoj diaj,
kion ja ili volas?
Per mia sang' aspergitaj
estas de l' dom anguloj ĉiaj -

Kial ni ribelis?
Ĉar alion ni ne scias ...
Ĉar alion ni ne povis!
Kaj kion ni povis?

Alfremdiĝi kaj foriri, eskapi al mond',
sin tirante kiel hund' foriri,
kun vosto ĉe kruroj,
sur fremdaj vojoj serĉi ripozon kiel
pilgrimantoj, povruloj, nevidantoj,
kiel almozpetantoj malpuraj?
Ni kiel brutoj ligitas al sinjora tero,
kaj la ripoz' forestas kaj forestos ĉiam, jen vero ...

Kiel ŝinko en ujo mi pekligās sange
en la hispana tubo ...
Trapikita kaj sangopusa, kota,
en buĉejo morta hund',
banata en hirud-peklajo kun sanga postajo,
vundita brule kiel kuko en formaĵo.

Kiel kripla skolopendro kun pikilo malpura
ekzekutist' min pikas orele per polekso sulfura
por ke mi daktu kaj konfesu:
“perfidanto ribelula!”



Kion konfesi mi povas?
Vulpoj kaj birdoj posedas la neston,
kaj homa filo, por tie meti kapon, li ne ...

Sang' min ne lasas dormi ...
Sang' povas dormi kaj ekdormi neniam,
kiel abelo ĝi bruligas.
Kiel barele el cisterno
murdist' el intest' barele sangon eligas ...
Sang' fluas kiel akvo kaj voĵ,
muelile tondras, surdigas,
ni iras post ĝi, post voĉ de sango nia -
Lunlume iu svingas per littuko sanga, fia,
iu en forno nigra lanterne lumas ...
Monahoj, juĝistoj kaj maskportuloj -
Sang' brulas, Sveti Križ brulas, Zabok brulas,
Celje fumas,

kiel fajroalarm' sang' sange sonoras:
jobbaey, pawer, pauer, bauer, rusticus, colon,
Mokric- kaj Samobor-anoj,
Kerestinec-knaboj, sonorson' ...
De Dobova ĝis Vindiŝlando
pulvoflamo, plumbo, polvo, fajro, do
al Ljubljana kaj Kaptol leviĝas vira bando ...
Sang' tra Savinja gutas, Ptuj kaj Ormož falčas ...
Monahoj, rabistoj, nigraj maskportantoj,
incendio, Somsedvar brulŝtupo,
en mia man' floras sanga tulipo ...
Kiel rubuso fumas sang'
sur kota al-Stubica vojo.
Batita hundo ĉe fajrujo mutas,
en domangulo, sur nenies vojo,
kaj levos ĝi la flagon dum iu fojo,
la honton nigre flavan, de servutul' sangsputon,
kaj koton nian sangan, kalvarian tuton ...
Kion volas monahoj, la sangaj kapuĉuloj,
sangtrinkantoj sangoŝataj, sangoverŝaj sanglekuloj?

Kiel in' menstruanta mi sangas apude,
kiel tuk' intesto en kumino fumas krude.
Sepdeksep miloj da sangoj bojas trude,
sange miksiĝas jam longe
kaj ĉio estas sango, nur sango, la sanga sangoverŝo,
sangaj akvoj, keloj, de sangaj korvoj far',
kaj profanaĵoj nigraj, sangaj kaj kotaj padoj,
ĉevaloj, sangaj kapoj, birdoj kaj birdaj flugadoj,
pied- kaj vindo-tukoj, fulmoj, ĉemizoj, ŝuoj etaj,
leteron sangan ni estas sendi pretaj
al Somsedvar,
kie aĉaj virinŝatuloj,
sangan povrulan drinkas kun fantomuloj.

Novajoj sangaj, inkub', ventoj, lunlumoj, rikoltoj,
Turkoj, Varaždin, Kanjiža, mortoj, buĉaj mortoj ...
Serpoj, hakiloj, Vieno, Vieno sanga kaj Drava,
Ljubljana, Celje, Sotla, Danub', Kupa, Sava,
inunde flosas kiel banusa flago rava
kap' servutula fava.

Tradukis: Josip Pleadin

PIV EN INTERRETO

La ideo pri enretigo de Plena Ilustrita Vortaro (PIV) ne estas nova, sed ĉiam estis amaso da skeptikuloj, kiuj opiniis, ke temas pri tro granda, tro ampleksa kaj antaŭ ĉio - tro multekosta projekto, por kiu estis antaŭvidita la necesa sumo de 10.000 eŭroj. Sed, jen, kio ŝajnis utopia, nun jam estas realo! Unu el la ĉefaj aktivuloj de la projekto, Jevgenij Gaus, informas ke la bezonata sumo estas kolektita. Videblas tio ankaŭ el la listo de donacintoj troviĝanta en la retejo www.vortaro.net. Eĉ plie, kolektiĝis pli ol 13.000 eŭroj, ĉefe dank' al malavaraj donacoj de franca esperantisto kaj desegnisto Serge Sire kaj grandaj donacoj de du aŭstraliaj Esperanto-asocioj.

Laŭ la informo de Jevgenij Gaus, la laboro pri la enretigo jam komenciĝis, kaj la unuaj rezultoj estos prezentitaj en la Universala Kongreso en Kopenhago.

PIV estas unu el la plej famaj Esperanto-verkoj de lastaj jardekoj. La organizo Edukado@Interreto (E@I) kunlabore kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) intencas krei retan kaj senpagan version de la fama PIV - Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Por tiu celo estis jam subskribita kontrakto, laŭ kiu E@I kreos la retejon kaj SAT disponigos la enhavon - la elektronikan version de la fama vortaro.

Jam multajn jarojn PIV estas la plej ampleksa difin-vortaro en Esperanto, sed bedaŭrinde pro sufiĉe granda kosto la papera eldono ĝis nun estis havebla nur por relative malgranda grupo de Esperanto-parolantoj. Post apero de la reta versio la situacio tute ŝanĝiĝos, la vortaron povos uzi tute senpage ĉiuj uzantoj, kiuj havas aliron al la interreto.

La projekto de reta PIV havas pli altajn ambiciojn, ol esti nur simpla cifereca versio de la papera eldono. Ĝi havas pli grandan potencialon, kiun la kreantoj de la retejo volus plene eluzi. La retejo havos forumon por ĉiu unuopa vorto, kiu ebligos viglan diskuton pri diversaj terminoj. Ĉiu povos kontribui, proponante eblajn novajn esprimojn, taŭgajn uzojn de certaj vortoj k.s. Laŭ la plano la retejo estos uzebla ne nur per komputiloj, sed ankaŭ per poŝtelefonoj. Estonte plej verŝajne eblus aranĝi, ke la vortaro estu uzebla ankaŭ ekster la reto, kiel instalebla programo.

KONGRESA TEATRAĴETO

“LA TREZORO DE L' ORAĴISTO”

✍ Marko Dragičević

Inspirita per la samnoma romano de August Ŝenoa, kaj prezentita far la Drama grupo de mezlernejanoj el Ekonomia kaj buroteknika lernejo de Bjelovar dum la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj.

1. GRGA SVATAS DORAN

GRGA: Bonan matenon, mastro Krupić!
PETAR: Bona ĝi estu, je dia favoro, sinjoro Grga. Kia bonŝanco venigas vin sub mian tegmenton?
GRGA: Mi deziras edziĝi, kaj jen mi venis por svati vian filinon Dora!
PETAR: Honoron kaj honeston al vi kaj via laboro, sed fruktojn ne estas konsilinde ŝirkolekti antaŭ ol ili maturiĝis, kaj fraŭlinojn oni ne edzinigu antaŭ ol ili estas pretaj fariĝi patrinoj. Estus tro frue, ja ŝi estas nur dekses-jara. Ne koleru pro tio.
GRGA: Mi ne koleras.
KORUSO: Sed li koleras.

2. PAŬLO SAVAS DORAN

KORUSO: Surstrate estas kaoso. Homoj krias kaj ravite rigardas ekzekuton. Ĉevaloj furiozas. Sur unu el ili falis fajrero kaj ili ĉiuj ekstampedis. La tuta ĉevalaro. La povra Dora trovis sin sola sur la strato. Ĉu la ĉevaloj tretos ŝin? Jes, ja! Tamen, ne! Jes, ja! Tamen ne, ĉar sur ĉevalo algalopis juna bravulo kiu lastmomente savis ŝin. Post tio naskiĝis amo ĉe la du gejunuloj. Sed li estas nobelo, kaj ŝi burĝino.

3. GRGA KAJ STJEPKO

STJEPKO: Ho, razisteto! Kia diablo venigas vin ĉi tien?
GRGA: Al vi mi direktiĝis, sinjora moŝto!
STJEPKO: Ĉu por diri al mi kion faras miaj amikoj zagrebanoj?
GRGA: Ne. Temas pri vi mem.
STJEPKO: Pri mi? Nu, ni aŭdu!
GRGA: La juna sinjoro Paŭlo stultiĝis.
STJEPKO: Pro kio, do?
GRGA: Pro la belulino Dora.
STJEPKO: Pro la zagrebano? Ĉu vi freneziĝis?
GRGA: Mi estas sopra, via moŝto. Mi vidis per la propraj okuloj! Li brakumis tiun fraŭlinon, kaj kisis ŝin.
STJEPKO: Bone! Ni solvos tion!

4. STJEPKO INTERPAROLAS KUN PAŬLO

STJEPKO: Mi aŭdis ke vi amas la filinon de l' oraĵisto. Tiu rilato estas malpermesata. Vi estas nobelo, kaj ŝi burĝino.
PAŬLO: Amo ne elektas je tia maniero!
STJEPKO: Ĉesu stultumi pri la amo! Vi edzinigos tiun, kiun mi elektos por vi. Iru al Samobor kaj portu al Klara ĉi tiun leteron.
PAŬLO: Mi iras, paĉjo.
KORUSO: Kaj li foriris.

5. PAŬLO ĈE KLARA

KLARA: Nu, trinku, Paŭlo.
PAŬLO: Por feliĉa estonteco.
KLARA: Ĉu vi scias, Paŭlo, kia estos nia estonteco? (Ŝi kaŝobservas lin kvazaŭ per serepenta rigardo). Vi estos mia, kaj mi la via, eĉ se Dio malkonsentos. Vi estas juna, ankoraŭ vi ne konas vian koron, ankoraŭ vi ne konas fajron de amo. Amo ne estas obeema kaj kara ŝafido. Ne, ne ... Ĝi estas furioza ĉevalo. (Ŝi ekvidas la bildon de Dalila sur la muro kaj la leteron).
PAŬLO: Mi konas vian animon eĉ sub la vizaĝo de anĝelo. Samsono mi ne estas, sed male, vi estas Dalila. Estu damnita vi, paradiza serpento. Niaj rilatoj estas finitaj.
KLARA: Paŭlo!

KORUSO: Sed Paŭlo foriris eĉ ne turninte sin!

6. PAŬLO KAJ JERKO:

KORUSO: Revenante, Paŭlo renkontis ...

JERKO: Paŭlo!
PAŬLO: Jerko! Ĉu vi ne estas muta? Kiel vi ekparolis? Vi helpas al mi kaj protektas Doran! Kial? Kiu vi estas?
JERKO: (silentas kun klinita kapo)
PAŬLO: Ĉu vi aŭdas min?
JERKO: Ne demandu min.



PAŬLO: Parolu! Mi petegas vin je tomo de patrino.
 JERKO: Mi estas via frato.
 PAŬLO: Ĉu vi freneziĝis? Kia frato?
 JERKO: Mi estas via frato. Eksterleĝa filo de via patro. Pro tio mi helpas al vi.

7. ĈOKOLIN KAJ KLARA:

GRGA: Mi havas proponon, por ke ni ĉiuj estu feliĉaj. Mi deziras edzinigi Doran, kaj vi edzigi Paŭlon. Ni devas nur disigi ilin.
 KLARA: Mi konsentas. Kion vi proponas?
 GRGA: Avantaĝe Dora ne estas nobelino, kaj Stjepko ne permesos al Paŭlo ŝin edzinigi.
 KLARA: Ĝuste. Stjepko do persistu pri tio kaj ne cedu. Iru kaj diru tion al li, kaj mi ĉion ordigos kun Paŭlo.
 (Grga foriras).
 KLARA (sola): Ĉar Paŭlo komprenis miajn intencojn, mi ne plu povas lin delogi. Se necese, mi mortigos Doran. Prefere Grga tion ne sciu, por ke mi povu lin eluzi. Mi ricevos la mian, kaj li kion Dio donos!
 KORUSO: Ho, malbenita sorto!

8. VENENIGO DE DORA

DORA: Sankta Dio!
 SOLDATO: Trankviliĝu, fraŭlino. Trankviliĝu se Dion vi kredas. La viaj nin venkis, kaj mi estas serioze vundita. Ne perfidu min. La viaj min mortigus. Mia vundo doloras, kaj la gorĝo sekas. Donu al mi iom da akvo!
 DORA: Mi ne perfidos vin, ĉar mi deziras morton al neniu. Eĉ se malamikoj niaj vi estas, laŭ la Dia vorto ankaŭ al malamikoj oni bonon faru.
 SOLDATO: Donu al mi akvon!
 DORA: Jen ĝi! Je via sano!
 SOLDATO: Kontrolu, fraŭlino, ĉu iu aliras la domon. (La soldato enjetas ian pulvoron en la akvon).
 DORA: Neniu estas proksime.
 SOLDATO: Ĉu vi havas vinon, fraŭlino?
 DORA: Jes, mi havas, sed vino malbone efikus al via vundo.
 SOLDATO: Via akvo estas malbongusta, malklara kaj varmeta. Vi mem gustumu!
 DORAS: Ĉu malbongusta?
 SOLDATO: Jen, mem gustumu ĝin. (Dora trinketis)
 DORA: Vi diras la veron, Ĝi estas amara! Strange!
 DORA MORTAS!
 KORUSO: Ho, malbenita sorto, vi tamen ne destinis al ŝi la amon!

Tradukis: J. P.

PRI INSULTO KAJ KALUMNIO

Ivo Lapenna

Unu el la grandaj Homaj Rajtoj estas la rajto je libereco de opinio kaj esprimo. Ĝi inkluzivas la rajton havi opinion kaj disvastigi ideojn kaj informojn per kiu ajn rimedo de komunikado senkonsidere al la limoj (art. 19).

La libereco de opinio estas interne persona rajto, dum tiu de esprimado estas natura sekvo kaj ekstera manifestiĝo de la unua.

Ofendo en jura senco de la vorto estas ĉiu atako al honoro kaj reputacio de persono. La du ĉefaj specoj de ofendo estas insulto kaj kalumnio. Insulto estas esprimado de malrespekto sen imputado de iu ajn ago aŭ fakto al la viktimo. Tial la vereco aŭ malverece de la imputo ne estas pruvebla. Male, kalumnio konsistas el malvera imputado de iu ago aŭ fakto, kiu atencas la honoron aŭ reputacion de la viktimo. La vereco aŭ malverece de la imputita fakto aŭ ago estas do pruvebla, kvankam kelkaj juraj sistemoj malpermesas eĉ tion en la plimulto de la kazoj. Preskaŭ ĉiuj juraj sistemoj distingas inter insulto kaj kalumnio, inter nepublika kaj publika ofendo.

La publikaj ofendoj estas pli forte punataj ol la nepublikaj.

La libereco de esprimado estas unu el la bazaj ŝtonoj de demokratio.

La demokratia rajto libere esprimi sian opinion neniam signifis nek povas signifi rajton insulti kaj kalumni. Insulto kaj kalumnio ne estas esprimo de demokratio, sed deliktoj kun radikoj en individua malico, malboneco, ĵaluzo, envio aŭ diversaj psikopatologiaj statoj, por ne paroli pri la denunca kalumnio, speciale peza tipo, kiun karakterizas ankaŭ speciale malnoblaj motivoj.

ĈU REFONDOTA ESPERANTO-SOCIETO EN BJELOVAR?

Sian lastan, la 13-an kunsidon la Organiza komitato de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj, okazigis la 15-an de junio en la dolĉaĵejo "Zagorje" en Bjelovar, por diskuti pri la financaj kaj programaj rezultoj de la aranĝo. Estis konstatite, ke la kongreso estis tre sukcesa, kion montras ankaŭ la financa rezulto (enspezoj: 44.081,00 kunaĵoj; elspezoj: 43.705,50 kunaĵoj). Kune kun la servoj pagitaj de niaj sponsoroj (ekz. kongresa ekskurso, kongresejo, manĝoj ktp.), la kostoj de la kongreso estas taksataj je inter 9.000,00 kaj 10.000,00 eŭroj, multe pli ol iu ajn alia ĝisnuna kroata kongreso. La rezulto estas des pli granda, ĉar temis pri maloportuna momento en la enlanda ekonomio. La 13-a kunsido de la Organiza komitato elstarigis la neceson eluzi la momenton de entuziasmo inter la lokaj kaj regionaj esperantistoj por (re)fondi Esperanto-societon en Bjelovar. Espereble ĝi povus okazi aŭtune ĉi-jare.



ĈU KOPRIVNICA KONGRESURBO EN 2012?

Ĉu la jubilea 10-a kongreso de kroataj esperantistoj okazos en Koprivnica en 2012? Tiun demandon devas respondi la KEL-estraro. Post bonaj rezultoj de la bjelovara kongreso, Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Đurđevac entreprenis sondadon de intereso ĉe lokaj kaj regionaj aŭtoritatoj en Koprivnica. La celo de tiu esploro estas, laŭeble, konsolidigi la Esperanto-eventojn en pli vasta nordkroata regiono: Bjelovar, Đurđevac, Koprivnica, Križevci. Komence de 2011, la intereson por organizi la jubilean 10-an kongreson, montris la urbo Split, sed la respondecoj de la Splita societo rezignis pri la gastigo de la kongreso eĉ antaŭ ol ili oficiale prezentis la ideon al KEL. Pro tio DEC el Đurđevac per siaj leteroj turniĝis al Urbo Koprivnica kaj Departamento Koprivnica-Križevci. La reprezentanto de DEC estis invitita viziti s-inon Ankica Nježić, estrinon de fako pri sociaj aktivecoj de Urbo Koprivnica kaj anstataŭanton de la departamentestro, s-ron Ivan Pal. En sia skriba respondo, la Urbo Koprivnica respondis: "Ĉar la organizado de la proponita aranĝo postulas konsiderindajn financojn kiujn kiel proponanto vi devas detaliĝi, ĉi-momente ni povas al vi promesi helpon per organizado de transporto por la partoprenontoj, kaj per disponigo de kongresejo", dum por aliaj elspezoj ĉi momente ni ne havas

planitajn financojn". La Departamento respondis: "Ni informas vin, ke Departamento Koprivnica-Križevci pretas subteni la proponitan projekton, se pri ĝi je pozitiva maniero sin esprimos la Urbo Koprivnica". Ambaŭ institucioj proponis al DEC, post ricevita decido de KEL, kandidatiĝi por necesaj financoj en la sekvontjaraj buĝetoj, respektive jam en septembro aŭ oktobro ĉi-jare.

Lige al la sama afero, DEC turniĝis ankaŭ al s-ro Mario Hudić, la estro de Loka komitato de Bregi, la vilaĝo tre konata en la historio de Esperanto, ĉar tie ekzistis tre forta kaj progresema vilaĝana societo fondita kaj gvidita de Ilija Puhalo. Al la estro de Loka komitato en Bregi estas proponite starigi memortabulon al Ilija Puhalo okaze de 75-jara datreveno de lia forpaso. La ideo estas principe akceptita, kaj la intenco estas, ke la memortabulo estu solene starigita en 2012, okaze de la (eventuala) jubilea kongreso en Koprivnica. Por la kongresejo estas petita la koncertejo "Domoljub", en kiu okazis ankaŭ la 7-a kongreso de jugoslavijaj esperantistoj en 1934.

La proponon organizi la kongreson en Koprivnica DEC oficiale sendos al KEL. Kiel parto de la Organiza komitato kunlaboros ankaŭ la membroj de la bjelovara Organiza komitato.

DENOVE PRI FRAN KOLAR-KROM

Post la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar, la esplorado pri Fran Kolar - Krom ekhavis siajn novajn dimensiojn.


La triesta esperantistino Laura Lukač, kiu partoprenis la kongreson, sukcesis havigi geedziĝateston de Francesco Kolar kaj Luigia Godina, kiuj geedziĝis la 26-an de julio 1904 en la preĝejo de Servola/Skedenj, iama fiŝista vilaĝo kaj nuntempe antaŭurbo de Triesto. En la atestilo pri geedziĝo la nomoj de Fran kaj Slava havas italajn formojn. Koincido de tiu eltrovo estas, ke Servola estas naskiĝloko de nia itala samideanino Laura, kiu mem surpriziĝis per tio. Ŝi kunsendis ankaŭ la bildkarton de la preĝejo en kiu geedziĝis Fran kaj Slava, kiun ornamas la foto proksimume el la periodo de ilia geedziĝo (1900).

La alia surprizo estis, ke la nepino de Fran Kolar, sinjorino Mirjana Hnilička el Beogrado, kiu estis honora kongresanino en Bjelovar, esprimis sian decidon donaci al Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac la raran ekzempleron de "La trezoro de l' oraĵisto", speciale binditan, kiu estis proprajo de la tradukinto mem. La libron alportis kiel speciala kuriero la ĉeĥa esperantistobiklanto Mirek Grena, kiu estis en Beogrado kaj revene vizitis Dokumentan Esperanto-Centron en Đurđevac.

Koran dankon al ĉiuj!



1 Stato: ITALIA Etat: Italie				Trieste
3 Servizio dello Stato civile di: TRIESTE Service de l'état civil de: Trieste				
3 ESTRATTO DELL'ATTO DI MATRIMONIO / Extrait de l'acte de mariage Nr. VOLUME IV PAG. 201 / Nr. 25				
4	Data e luogo del matrimonio Date et lieu du mariage		Jo Mo An 26 07 1904	
	5	Marito / Mari		6
		Moglie / Femme		
7	Cognome prima del matrimonio Nom avant le mariage		KOLAR GODINA	
8	Prezomi Prénoms		FRANCESCO LUIGIA	
9	Data e luogo di nascita Date et lieu de naissance		Jo Mo An 08 05 1877	Jo Mo An 25 08 1878
10	Cognome dopo il matrimonio Nom après le mariage			
11	Altre enunciazioni dell'atto: Autres énonciations de l'acte:			
12	Data di rilascio firma e bollo Date de délivrance, signature, sceau		Jo Mo An 25 05 2011	
SIGNED: <i>Carlo</i> SYMBOLS / ZEČKE / SYMBOLE / SIMBOLOS / ETMBOLA / SIMBOLI / SYMBOLEN / SIMBOLOS / ISARETLER / SIMBOL				





La ĉefaj protagonistoj de la zagreba IKUE-kongreso (de maldekstre): Miloslav Švácěk, Marija Belošević kaj Lajos Kóbor dum iu el antaŭaj IKUE-kongresoj.

La 64-a IKUE-kongreso Zagrebo, 2011

Redakcia kompilo (laŭ novaĵagentejo IKA)

La 64-a IKUE-kongreso, aranĝo de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, okazis inter la 16-a kaj 22-a de julio 2011 en la Ĉefepiskopa granda seminario en Zagrebo. Per tiu sia aranĝo, IKUE simbole revenis al Zagrebo post unu jardeko, ĉar en 2001 okazis en la kroatia ĉefurbo komunaj Ekumena Esperanto-kongreso kaj IKUE-kongreso. Ĉi-jare la kongresa ĉeftemo estis la citaĵo el Evangelio de Luko: **"Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo. Kaj eĉ unu haro de via kapo ne pereos"**. La subtemoj inkluzivis persekutojn kontraŭ kristanoj en la mondo, ateston de martiroj dum la historio de la Eklezio, signifon de martiriĝo, la ateston de Johano Paŭlo la 2a en la jaro de lia beatproklamo, interreligian dialogon en dokumentoj de la Katolika Eklezio, dialogon por la repaciĝo kaj la rolon de Esperanto en ĝi. Kiel aldonajo estis pritraktita la temo "Privataj laikaj organizoj en la Eklezio: rajtoj-devoj".

En la malferma tago, la 17-a de julio, la kongresanojn nome de la zagreba ĉefepiskopo, kardinalo Josip Bozanić, salutis la zagreba helpepiskopo Ivan Šaško, kiu akcentis la simblan spektron de temoj grupitaj ĉirkaŭ iomete nekutima, sed defia ĉeftemo kun la citaĵo el Evangelio de Luko.

Post la malfermo sekvis prelegoj de reprezentantoj de katolikaj organizoj. Ĝurda Arbutina el Franciskana laika ordeno, Loka frataro el Kaptol, parolis pri la Spirito de Asizo, Nikolina Delaŝ el Jarmina pri kontribuo de katolikaj skoltoj al interkompreniĝo kaj helpo en spirita maturiĝo

de infanoj kaj junuloj. Profesorino Anica Math, diplomita flegistino el Kroata asocio de katolikaj flegistinoj parolis pri "Sano, malsano, suferado: beata Johano Paŭlo la 2-a kaj malsanuloj", kaj profesoro Branko Korbar, prezidanto de Kroata katolika societo de klerigaj laboristoj, parolis pri katolikaj kleruloj en la komunista tempo. Personan ateston pri persekutoj de katolikoj en Ĉeĥoslovakio dum la 1970-aj jaroj prezentis la prezidanto de IKUE Miloslav Švácěk.

La unuan tagon sian prelegon-rememoron pri la kunlaboro kun la kardinalo Ratzinger, prezentis ankaŭ la emerita profesoro Ivan Golub.

La 17-an de julio la katolikaj esperantistoj preĝis rozarion sur la tombo de beata kardinalo Alojzije Stepinac, kaj en la zagreba katedralo la meson en Esperanto celebris pastro Lajos Kóbor el Hungario, kiu per tiu ĉi meso jubileis 50-an jariĝon de sia pastreco.

La 18-an (lunde) la kongresanoj pilgrimis al urbo Ludbreg, konata kroata pilgrimejo.

Dum la kongreso okazis ankaŭ la ĝenerala kunveno de IKUE, pilgrimoj al Krašić (vizito al memorĉambro en kiu mortis la beata kardinalo Alojzije Stepinac) kaj al diocezo en Sisak, preĝo ĉe la tombo de la beata Ivan Merz kaj aliaj programoj.

La ĉeforganizanto de la aranĝo estis Marija Belošević. Pri la aranĝo informis la katolika novaĵagentejo IKA, kaj la informon transprenis ankaŭ la katolika radio en Zagrebo kaj la katolika gazeto "Glas koncila".



KIEL MI VIRTUALE ĈEESTIS LA IKUE-KONGRESON EN ZAGREBO

Radenko Milošević

En la 21-a jarcento, kiam la papo Benedikto la 16-a "urbi et orbi" invitas al ekumenismo, zagrebaj kaj kroataj esperantistoj, grandparte katolikoj, povas senti amarecon. Kial? En Zagrebo dum unu julia semajno sian 64-an kongreson okazigis Internacia katolika unuiĝo esperantista. Bedaŭrinde, pro nekontaj kialoj, la kroata esperantistaro ne estis informita pri la evento, nek invitita partopreni ĝin. La afero estas des pli malĝojiga, se oni scias, ke unu el la organizantoj estas s-ino Marija Belošević, kiu kun la nuna vicprezidanto de KEL komencis de tempo al tempo, jam en eksa Jugoslavio organizi mesojn por esperantistoj-katolikoj.

Sed, mi tamen almenaŭ virtuale ĉeestis la IKUE-kongreson! Mi rememoras la proverbon de mia forpasinta avino: "Strangaj estas la vojoj Diaj!" Partopreninte la sanktan meson kaj la entombigon de mia jugoslavarme kamarado pastro Stipo Sošić en apudzagreba vilaĝeto Savski Nart, mi interparolis kun kelkaj pastroj kaj akompanis mian konaton dum lia lasta surtera vojaĝo al eterneco. Rememorante pri nia Stipo, kiu mortis pro la konsekvencoj de la serbaj miltkoncentrejoj Keraterm, Omarska kaj Manjača, en kiuj li pasigis kelkajn monatojn komence de 1990-aj jaroj, ni tuŝis ankaŭ la temon de Esperanto. Esperanto, kiu estas mia duonjarcenta ŝatokupo!

Iuj jam sciis, ke mi estas sekretario de Paroĥa pastoralo konsilio, kaj ke mie stis reprezentinto de Kroata paroĥa konferenco ĉe kunveno en Prago en la jaro 1991. Dum intersalutado kun iu pastro, mi diris: Ĉu vi ne rememoras min? Verdirite, ni havas jam du jardekojn la ci-interrilaton! Li estis grekkatolika pastro Mile Vranešić, episkopa vikario de Žumberak, kiu tuj rememoris ĉion el tiu pasinta tempo.

Tuj alhastis la demando kiu surprizis la aliajn ĉeestintojn: "Kial ci ne ĉeestas la IKUE-kongreson, kies partoprenantojn ĝuste hodiaŭ mi gastigos?" Mi klarigis la neĉeeston - simple per nericevita invito. La pastro Vranešić tuj invitis min al la vespermanĝo en Krašić, kaj demandis: "Ĉu mi salutu s-inon Marija?" Mi jesis la saluton, kaj diris ke mia alveno embarasigus ne nur min. Mia konato Mile, ne povis kompreni, ke mi kaj aliaj esperantistoj, kaj aparte katolikoj-esperantistoj aŭ la zagreba kaj kroata Esperanto-organizoj ne estis invititaj, kaj ke la prikongresa informo ne estis konigita al ili.

Iu inter la ĉeestintaj pastroj komentis: "Nekredeble ke tio okazas, sed ĝi estas kutima, kaj ne nur inter kroatoj. Iuj kredantoj ĝis la preĝeja elirpordo estas tiaj, kaj post la eliro ili estas tute aliaj!"

Jen, per tio komenciĝis kaj finiĝis mia virtula ĉeesto, kion mi treege bedaŭras!

Polo Lukasz Żebrowski fariĝis la nova prezidanto de TEJO. Decidis tiel la Komitato de TEJO, kiu kunvenis en Kievo dum la ĉi-jara IJK. La postenon de ĝenerala sekretario daŭre plenumos Paulina Kožuchová. Inter la novaj estraranoj estas Alisa Nikitina kiu estiĝis kasisto. La resto de la estraro estas: Sergeo Tyrin (informado, la ĝisnuna kasisto), Nico Huurman (aktivula trejnado), Petra Smidéliusz (landa agado), Michael Boris Mandirola (eksteraj rilatoj) kaj Tina Tišljar (kongresoj).

Inter la 23-a kaj 28-a de junio en la Esperanto-Domo de La Chaux-de-Fonds (Svislando) okazis la dua Ateliero pri beletra kreivo, organizita de Kultura Centro Esperantista kunlabore kun Feminisma Esperanta Movado, kiun partoprenis virinoj el Aŭstralio, Francio, Hungario, Italio, Kroatio kaj Svislando. La akcento estis metita al poezio, kun relativa rilato ankaŭ al kantado. La atelieron gvidis Giorgio Silfer.

La 27-an de aŭgusto en la urba biblioteko de la Chaux-de-Fonds en Svislando okazos festotago honore kaj omaĝe al Claude Gacond okaze de lia 80-jariĝo. Tiukaze estos prezentita festlibro prizorgita de Reinhard Haupenthal kaj enhavanta kontribuojn de pluraj eminentaj diverslandaj esperantistoj.

Kontraŭ 30.400 eŭroj Kroata Esperanto-Ligo komence de junio vendis sian nemoveblaĵon (la ejon en Velika Gorica kun 76 kvadrataj metroj).

Inter la 1-a kaj 6-a de aŭgusto okazos la 12-a MIRO (Mirinda Internacia Renkontiĝo), la aranĝo de Kroata Esperanto-Junulara Asocio. Ĝi okazos en la "verda koro" de Kroatio, en Stara Sušica. Pliaj informoj ĉe: <http://www.keja.hr/miro/eo/index.html>

La 17-an de septembro 2011 okazos Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj en la bieno de Spomenka Štivec en Hraščina. La ĉefa temo estos: "Omaĝo al Vasilij Eroŝenko (1890-1952)", pri kiu prelegos la ĉefa gasto Mikaelo Bronŝtejn.

Meze de julio la nova eldono de "Pasporta Servo 2011" estis distribuita al membroj kaj gastigantoj. Ĝi enhavas 1087 adresojn el 90 landoj, kio estas multe malpli ol en la antaŭa(j) jaro(j). En Kroatio ekzistas nur tri membroj de Pasporta Servo, kio estas tro malmulte kompare kun la intereso de eksterlandanoj pri Kroatio. Landa organizanto estas Tomislav Divjak tomislav.divjak@ina.hr ĉe kiu aliĝu novaj gastigantoj.

LA JARO 1861

 Radenko Milošević

En la vivo de nacioj kaj ŝtatoj ekzistas jaroj plenaj je grandaj eventoj kaj gravaj homoj. Unu el tiaj jaroj por kroatoj kaj Kroatio estis la jaro 1861. Tiun jaron, antaŭ unu kaj duona jarcentoj, estis naskita la elstara kroata politikisto, verkisto, publicisto kaj tradukisto August (Gustav) Harambašić kaj la prokroata Jura partio (en la jaro 1903 alpreninta la aldonajon *kroata*). Ĝi agadis sur la teritorio de Kroatio, gvidinte la kroatan nacian movadon kontraŭ Aŭstrio kaj Hungario.

August Harambašić politike adoptis la politikan linion de Ante Stračević, alinomita "patro de hejmlando", la fondinto de Jura partio. La politikaj konceptoj de ambaŭ politikistoj estis influitaj de la ideo pri "kroata ŝtata juro". August Harambašić estis deputito de Kroata jura partio (kroate nomita: *Pravaši*) en la kroatia parlamento *Sabor* ekde la jaro 1901.

D-ro Harambašić, profesia juristo, komencis labori kiel advokato, sed tuj post la publikigo de sia politiktema proza poemo "Tri preĝoj", li estis kondamnita je 15-monata karcero, el kiuj li pasigis 6 monatojn mallibera. Ĉe la fino de 1880 li aliĝis al la junulara alo de la jurpartia movado kaj en 1895 li defendis la studentojn kiuj bruligis la hungaran flagon en Zagrebo la 16-an de oktobro 1895, kriinte: "Gloron al Jelačić!" kaj "Retiriĝu, hungaroj!".

Kiam la Jura partio skismis, li restis en ĝia kerna parto, kaj post la formiĝo de t.n. Kroat-serba koalicio, malgraŭ la sekvado de la komuna politika linio, li per siaj paroladoj kaj vidpunktoj atestis pri jam tiam videbla karakterizo de tiu koalicio kaj la rolo de ĝia kroata parto. En la komeco de 1909 li ekŝiĝis el la Kroata jura partio kaj el la koalicio.

En sia duonjarcenton longa vivo li abunde kontribuis al kroataj kulturo kaj politiko. Menciendas lia propono gratuli, okaze de la dudeka datreveno de lia pontifikeco, la papon Leo la 13-a, kies encikliko "Rerum novarum" (*Novaj aferoj*) pri nepreco de socia ordo ankoraŭ ĉiam estas instruinda. Pro tiu propono Harambašić estis ene de Jura partio akuzita pro klerikalismo. Pro la subteno al popolaj demonstracioj, kun du aliaj membroj, al li estis malpermesite partopreni la parlamentan laboron dum 15 kunsidoj.

Li partoprenis en preparo de traktajo kiu anticipis la pretigon de *Rijeka-a rezolucio* en 1905, en kiu la kroataj deputitoj subtenis Hungarion kontraŭ Aŭstrio, sub kondiĉoj ke ĉesu la konfliktoj inter kroatoj kaj hungaroj, cele al unuiĝo de partoj de Triunua reĝlando kun konstituciaj liberecoj por Kroatio. Li estis prezidanto de la parlamenta komitato por translokigo al la patrujo de ostoj de kroataj granduloj Zrinski kaj Frankopan. Liaj patriotaj kaj politikaj,

lirikaj kaj romantikaj poemoj, skribitaj sub diversaj pseŭdonimoj, estas tre multaj.

Precize antaŭ cent jaroj, la 16-an de julio 1911, mortis Harambašić, tiu brava kroata viro kaj politikisto, batalinto por memstara kaj sendependa kroata ŝtato, kaj li estis entombigita en la arkadoj de la tombejo Mirogoj en Zagrebo.

Kroata jura partio estas unikaĵo en la eŭropa parlamentismo pro sia nomo. Post la ilirapopola ideologio kaj la movado al kiu apartenis multaj elstaraj kroatoj de tiu epoko sub la gvido de d-ro Ljudevit Gaj, post rifuzo de la absolutismo de Bach kaj reveno de konstituciaj rajtoj, en tiam Kroatio regis kaosa situacio. La kerna demando por tiutempaj partioj - la Popola de Strossmayer kaj la Unionista (hungare orientita) - estis la demando de interrilatoj kun Aŭstrio kaj Hungario. En tiaj cirkonstancoj aperis Jura partio, kies ĉefa principo difinita de Ante Starčević estis: "Nek al Vieno, nek al Peŝto, sed por libera kaj memstara Kroatio!"

La Jura partio fariĝis unu el la plej potencaj kaj plej influaj politikaj organizoj de tiu epoko en Kroatio, dank' al la du kunfondintoj: Ante Starčević kaj Eugen Kvaternik. La dua parto de la 19-a jarcento estas konsiderata politike kiel periodo de matura kroata naciismo. En *Sabor* oni ĉiam pli ofte diskutis kaj disputis pri la pozicio de Kroatio en la rilatoj kun hungaroj kaj ene de Hungario. Ĝi estis bona fundamento por la oficiala debuto de la jurpartia ideologio. Laŭ la ordono de la aŭstria imperiestro kaj kroata reĝo Francisko Jozefo la 1-a, la kroata parlamento komencis pridiskuti la demandojn de interrilatoj inter Kroatio kaj Hungario. Ekzistis en la parlamento kaj en Kroatio tri tendencoj: tiu de la Popola partio, kiu intencis atingi kiom eble pli vastan aŭtonomion, akomodigante al politikaj cirkonstancoj, tiu de la Unionista partio kiu havis la politikon pri tre proskima interrilato kun Hungario, kun iaspeca aŭtonomio de Kroatio enkadre de Hungario, kaj tiu de la Jura partio kiu starigis kiel sian celon ekŝiĝon de Kroatio el la Habsburga Imperio, kaj la retenon de unika rilato kun aliaj landoj nur per komuna monarĥo.

En 1861 en la parlamento per plimulto da voĉoj estis akceptita la t.n. Artikolo 42, kiun proponis Ivan Mažuranić, kaj tiu decido ricevis la aprobon far la reĝo. Tiu artikolo parolas pri la preteco de Kroatio aliri la ŝtatan unuiĝon kun Hungario nur tiam, kiam Hungario akceptos la memstarecon de Kroatio kaj ĝian teritorian unuecon. En ĝi oni aparte akcentas la eventojn el 1848, dum kiuj la ŝtatjuraj ligoj inter Kroatio kaj Hungario estis disigitaj, kaj Kroatio fariĝis sendependa ŝtato, sed ke ambaŭ ŝtatojn kunligas nur la persono de komuna monarĥo.





“La historia precedenco” (ZE 1/2011, paĝo 3)

En la telefona reago Ivo Borovečki el Pula, kiu en 1945 estis kunfondinto de Esperanto-societo “Bude Borjan” atentigis nin, ke la societa sidejo neniam troviĝis en la strato Primorska, kiel oni asertas en la menciita teksto. La teksto citas la klarigon de Anto Mlinar eldiritan en la malfonda kunveno de “Bude Borjan”. La sidejo de “Bude Borjan” en la komenco troviĝis en la strato Neznane junakinje, proksime al Laborista hejmo en Zagrebo. Temis pri malgranda ejo, troviĝanta en la teretaĝo dekstre. Tie la societo fukciis ĝis la translokiĝo al Amruŝeva strato en la jaro 1947.

“La historia precedenco” (ZE 1/2011, paĝo 3)

Mi ĵus ricevis la revuon “Zagreba Esperantisto”. Ĝis nun mi nur ĵetis rigardon al ĝi, sed tuj rimarkis, ke en Kroatio oni prisilentas la nomon de Ivo Lapenna. Kiel vi verŝajne scias, Ivo Lapenna prizorgis, ke la

esperantistoj havu la apartementon en la strato Amruŝeva 5. Tamen oni eĉ ne mencias lian nomon en tiu kunteksto.

Birthe Lapenna, Kopenhago (Danlando)

“La historia precedenco” (ZE 1/2011, paĝo 3)

Kun plezuro mi ricevadas kaj legas “Zagreba Esperantisto”, pli bone redaktatan ol estas redaktata ekz. la UEA-revuo! En la n-ro 1/2011 de ZE, ĵus veninta, vi ĉefartikolas pri la malfondo de la longtradicia ĉefklubo Zagreba, eĉ kroatia, *Bude Borjan*. Tio estas komprenebla, sed sufiĉe ŝoka informo. Mi ne memoras ie ajn legi pri tio, certe ne en la UEA-revuo. Laŭ mi, nepregus raporti pri la malfondo de *Bude Borjan*, ĉar temas pri simptomo pli ĝenerale observebla en Esperantujo. (Cetere, laŭ mi, en si mem la malvigliĝo de kluboj ne nepre estas negativa - jen, simple, evoluo laŭ nia epoko).


István Ertl (Luksemburgio)

“La historia precedenco” (ZE 1/2011, paĝo 3)

N.N. el Zagrebo (la nomo konata al nia redakcio), kiu volas resti anonima, starigis jenan demandon: “Laŭ la membrolisto, la Esperanto-societo “Bude Borjan” en 2010 havis 97 membrojn kun pagita jarkotizo. Se tiu sama nombro da esperantistoj membris ankaŭ en 2011, la asembleo ne rajtis akcepti la proponon de sia estraro pri malfondo de la societo, ĉar ĝi bezonis almenaŭ 49 partoprenintojn en la malfonda kunveno por havi kvorumon (sed partoprenis nur 35). Se la societo havis malpli da membroj en 2011 (kaj tion la verkinto de la artikolo nur supozigas!), tiam ĝi ne povas havi 8 reprezentantojn en la asembleo de Kroata Esperanto-Ligo, respektive ankaŭ ne 5 membrojn en la estraro de KEL. Ĉar la malfonda kunveno okazis la 20-an de aprilo, kaj la jarkunveno de KEL la 18-an de junio, ĉu la partopreno de 8 membroj de *Bude Borjan* en la KEL-jarkunveno estas jure kaj statute pravigebla?”

Preseraroj

Kelkaj legantoj atentigis nin pri oftaj preseraroj en la publikigitaj tekstoj, kiuj ĝenas la legadon kaj kelkfoje povas kaŭzi miskomprenon. La redakcio komprenas la problemon, sed malgraŭ niaj pluraj provoj trovi kapablan kaj bonvoleman provleganton, ni ne sukcesis. Se iu el la legantoj kapablas kaj volus volontule provlegi niajn tekstojn, ni petas ke tiu senprokraste kontaktu nian redakcion.



Porinfana romano
Formato: 16,5 x 20,5 cm
Amplekso: 102 paĝoj
Fortika bindo (kudrita).
Prezo: 9,00 eŭroj
Rabato: 1/3 ekde tri ekzempleroj
Poŝtkostoj: 15%
Mendu ĉe: grafokom@kc.htnet.hr



Ni estingas fajron ekde 1930

fajroestingaj aparatoj kaj ekipaĵoj
memaktivigaj aparatoj
stabilaj sistemoj
fajroestingado
sanprotekto kaj sekureco
mediprotektado
sekureco kaj prevento de akcidentoj

PASTOR
G R O U P

www.pastor-group.com



GASILSKA OPREMA • GASILSKI SERVIS • GASOP • PASTOR BH • PASTOR DISTRIBUCIJA I INŽENJERING • PASTOR KOSOVA • PASTOR
MAKEDONIJA • PASTOR PROTUPOŽARNI SISTEMI • PASTOR SERVIS • PASTOR TVA • VATROSPREM • PASTOR FIRE&SAFETY
BOSNIO KAJ HERCEGOVINO • KOSOVO • KROATIO • MAKEDONIO • MONTENEGRO • RUMANIO • RUSIO • SERBIO • SLOVENIO